

Kie staras la normigado de la ĉuvaŝa lingvo?

Hèctor Alòs i Font

[Teksto prezentita en la universitata seminario pri naciaj kaj internaciaj lingvoj kadre de la 14a Internacia Lingva Festivalo, 16an de oktobro 2009]

Resumo

La parolantaro de la ĉuvaŝa lingvo malkreskas: ĉesas ĝia intergeneracia transdonado precipe, sed ne nur, en la urboj je niveloj multe pli altaj ol en aliaj regionoj de Rusio. La artikolo diskutas la staton de la normigado de la ĉuvaŝa lingvo en la Ĉuvaŝa Respubliko laŭ la ŝtupoj de la modelo de Haugen, kun speciala atento al la registaraj agadoj por la socia disvastigo de la lingvo. Tiuj agadoj baziĝas preskaŭ sole en la deviga lerneja instruado de la ĉuvaŝa, kiu montriĝas manka, neefika kaj fora de la alilandaj sukcesaj pedagogiaj metodoj. Krome preskaŭ forestas paralelaj politikoj por efektiva reensociigo de la lingvo, same kiel regula kaj ĝisdata observado de la evoluo de la socia stato de la lingvo por kompreni la rezultojn de la farataj agadoj kaj gvidi ilin. Siavice la neregistara porlingva agado montriĝas ankaŭ tre malforta.

Резюме

Количество людей владеющих чувашским языком сокращается: прекращается процесс передачи родного языка из поколения в поколение особенно в городах (но не только) на уровне значительно более высоком, чем в целом в других регионах Российской Федерации. Статья затрагивает вопросы нормализации чувашского языка в Чувашской Республике в соответствии с моделью Хаугена. Особое внимание обращается на действия властей по развитию чувашского языка, которые сводятся почти только к организации обязательного школьного обучения чувашскому языку, которое, как показывает опыт, является недостаточным, неэффективным и далёким от успешных зарубежных методик. Кроме этого, почти отсутствуют одновременные меры по эффективной ресоциализации языка, также как и регулярные и своевременные наблюдения за развитием состояния языка в обществе, для анализа результатов предпринимаемых мер и для управления этими процессами. В свою очередь деятельность общественных организаций по поддержке и развитию чувашского языка проявляется очень слабо.

Indekso

RESUMO.....	1
INDEKSO.....	2
1 ENKONDUKO.....	3
2 LA STATO.....	4
3 LA PROCEZO DE LINGVONORMIGO.....	7
4 LA ELEKTADO KAJ LA KODADO EN LA ĈUVAŜA LINGVO.....	10
5 LA SOCIA DISVASTIGO.....	11
6 LA ELLABORADO.....	24
7 LA AKCEPTADO KAJ REVIZIO.....	24
8 KONKLUDOJ.....	25
PRI LA AŬTORO.....	26
BIBLIOGRAFIO.....	26

Kiam homo komprenas, ke lia denaska lingvo ne estas normigita kaj utiligebla en ĉiaspecaj formalaj komunikoj (registaraj aktivecoj, literaturo, radio, lernejoj ktp), tiam li povas fariĝi indiferenta al la interferoj, kiujn ĝi povas suferi.

Uriel Weinreich (1953)

1 Enkonduko

Mi pardonpetas pro mia entrudiĝo: mi ŝatus starigi iom impertinentan demandon en scienca rondo de fakuloj pri la ĉuvaŝa lingvo: kie ni staras en la normigado de la ĉuvaŝa lingvo?

Mi starigas la demandon el vidpunkto de la sociologio de lingvoj. Kiel vi scias, eblas rigardi la lingvojn ne nur kiel strukturojn, kies elementojn oni metode analizas sendepende de la parolantoj, sed ankaŭ kiel psikosociajn realaĵojn. Simile en sociologio eblas analizi ekz. la uzadon de alkoholo. Mi ne hazarde komparas sociologion de lingvoj al tiu de drinkado: kelkaj sociaj patologioj portas al memdetruo kaj samtempe al forlaso de la propra lingvo kaj al epidemia drinkado: tiel estas bedaŭrinde atestate tra diversaj kontinentoj en la tuta mondo, inkluzive de Rusio¹.

Kiel vi konscias, la rapida disfalo de socia strukturo sen tio, ke la koncernatoj sentas evidentan pliboniĝon aŭ esperon je ĝi, kaŭzas severajn ekonomiajn problemojn: plialtiĝon de alkoholismo kaj de aliaj drogodependiĝoj, kreskon de la nombro da memmortigoj, malstabiliĝon de la familia vivo, pli altajn forlasojn de studado kaj foreston el la laboro, pli malaltajn viv-esperojn kaj naskokvanton ktp. Aparte atentinda estas ankaŭ la pli granda elmigrado, tre trafanta Ĉuvaŝion kaj ĉiujare seniganta ĝin je junaj valoraj fakuloj, kies instruadon pagis grandparte iliaj eksaj kuncivitanoj, sed kies fruktojn ili ne ĝuos. Pro tio, ĉia helpo al aprezo de la propraj kulturo kaj lingvo efike kontribuas al stabileco, sekve ni senhezite rajtas taksii, ke la prizorgado de lokaj lingvoj estas bona ekonomia investo.

Bedaŭrinde socilingvistiko, kaj ĝia subfako sociologio de lingvoj, estas malmulte disvastiĝinta en Ĉuvaŝio: laŭ mia scio ĝi estas instruata kiel stud-objekto en neniu ĉuvaŝia universitato, kvankam lokaj lingvistoj verkis diversajn valorajn artikolojn pri tiu fako. Bedaŭrinde ili estas malmultaj kaj dise aperintaj en malgrandaj lokaj eldonaĵoj; eĉ ne mankas okazoj, kie valoraj esploroj restas nur parole prezentitaj en kunsidoj kaj kuŝas neeldonitaj. Tio estas aparte mirinda en oficiale dulingva lando, kies lingvopleĝo tekstas enkonduke:

La konservado kaj disvolvigo de la ĉuvaŝa lingvo estas esprimita en la leĝa firmigo de ĝia statuso, kreante kondiĉojn por ĝia aktiva uzado en la publika kaj socia vivo, apogante ĝian altan prestiĝon, same kiel farante la necesajn paŝojn por ĝia normaligo kaj scienca evoluigo. (Ĉuvaŝkaja Respublika 2003)

Sed tiujn leĝajn aspektojn ni tuŝos poste. Kiel dirite, la celo de tiu ĉi komunikado estas diskuti la staton de la normigado de la ĉuvaŝa lingvo. La procezo de lingvonormigado havas jam klasikan modelon difinitan de Einar Haugen (1983) laŭ kvar fazoj, kiuj, akorde kun la revizio de Bastardas (1996) estas: elektado, kodado, socia disvastigo kaj ellaborado. Ni supraĵe analizos la modelon por tuj sekve analizi la staton de la ĉuvaŝa laŭ tiu perspektivo, kun speciala atento al la tria, disvastiga, ŝtupo.

Sed antaŭ ol komenci, permesu mallongan superrigadon al la stato de la lingvo, kiu helpos nin antaŭeniri sur pli firma bazo en la sekvo.

¹ Kolga, Tōnunist k.a. ligas alkoholismojn kun etna kaj lingva disfalo ĉe almenaŭ naŭ rusiaj popoloj: aleutoj, andioj, botliĥoj, ĉukĉoj, inukoj, kolaj sameoj, mansoj, selkupoj kaj ŝoroj (Kolga, Tōnunist k.a. 1991).

2 La stato

Kiel vi scias, la ĉuvaŝa lingvo malkreskas. Mi ĉi tie okupiĝos nur pri la Ĉuvaŝa Respubliko, la kerno de la lingvokomunumo, kvankam ni ĉiuj bone konscias, ke la eksterrespublikaj ĉuvaŝoj konsistigas ĉ. 45% de la ĉuvaŝa popolo (Ivanov 2005: 19). Pluraj el tiuj grupoj estas same longe establiĝintaj en siaj loĝlokoj kiel la ĉuvaŝoj en la hodiaŭa Ĉuvaŝa Respubliko. Sendube ilia nombro kaj kompakta loĝado igas, ke la plua uzado de la nacia lingvo en tiuj areoj estas gravega por la daŭrigo de la lingvokomunumo, kaj ne indas ilin neglekti. Tamen samtempe klaras, ke por tiuj grupoj la situacio en la Respubliko estas referenco, kiel montras tio, ke ne malofte iliaj membroj venas studi en la Respublikan ĉefurbon. Tial, por simpligo, mi okupiĝos nur pri la stato de la lingvo en la Ĉuvaŝa Respubliko. Eĉ pli: ĉiuj komunumoj havas dominantajn grupojn fiksan la tendencojn. En niaj socioj urboj tiel rolas en rilato al la kamparo. Sekve mi ĉi tie ĉefe pritraktos la respublikajn urbanojn.

La regreso de la lingvo estas evidenta surbaze de donitaĵoj de Vitalij Ivanov (2005: 279), kiam li komparas la evoluon de la ĉuvaŝlingvaj ĉuvaŝoj en la Respubliko: ili transiris de 94,5% en 1970 ĝis 85,0% en 1989. Tamen estas ŝlosila diferenco inter urba kaj kampara loĝantaro: dum ĉe la dua la lingvoanstataŭado estas, laŭ tiuj ĉi donitaĵoj, preskaŭ neperceptebla, ĉe urbaj ĉuvaŝoj la parolkapablo en la ĉuvaŝa falis de 78,0% ĝis 69,4%. (Vd. Tabelon 1)

Plena loĝantaro			Urba loĝantaro			Kampara loĝantaro		
1970	1979	1989	1970	1979	1989	1970	1979	1989
94,5%	89,8%	85,0%	78,0%	72,0%	69,4%	99,3%	98,4%	98,5%


Tabelo 1: Evoluo de la procento de ĉuvaŝlingvanoj inter etnaj ĉuvaŝoj en la Ĉuvaŝa Respubliko (Fonto: Ivanov 2005: 279)

Kvankam tiuj donitaĵoj estas zorgigaj, ni rajtas multe pli timi pri la estonteco de la lingvo, kiam ni rigardas la infomojn laŭ aĝoj. Baskakov kaj Nasyrova, surbaze de la popolnombrado de 1989, montras, ke nur 30% de etne ĉuvaŝaj urbaj infanoj sub 15 jaroj estas denaske ĉuvaŝlingvaj (Baskakov k Nasyrova 2000: 76). Krome, tio estas unika ĉe ĉuvaŝoj kompare kun aliaj rusiaj tjurklingvaj popoloj: nur dolganoj —loĝantaj preskaŭ ekskluzive en vilaĝoj— iom proksimas (30–40% en diversaj grupiĝoj inter 0 ĝis 15 jaroj), kaj sekvas ĥakaso kaj altajanoj (ĉ. 50%). Ĉe la proksimaj kaj pli kompareblaj baŝkiroj temas pri 55-60% kaj ĉ. 70% por tataroj. Ankaŭ la kvanto de kamparaj denaskaj ĉuvaŝlingvanoj montras lingvan anstataŭadon: 84%. (Vd. Tabelon 2)

Nacieco	Urba loĝantaro	Kampara loĝantaro
Ĉuvaŝoj	30%	84%
Tataroj	72%	90%
Baŝkiroj	60%	78%

Tabelo 2: Procentoj de infanoj ĝis 6 jaroj, pri kiuj oni deklaris la etnan lingvon kiel denaskan (Fonto: Baskakov k Nasyrova 2000: 76, surbaze de la sovetia popolnombrado de 1989)

Bedaŭrinde, la popolnombrado de 2002 (Statistika Rosii 2004-2005) ne donas informojn pri lingvokonoj laŭ aĝoj. Ĝiaj lingvaj informoj estas surprize malriĉaj (malgraŭ ke la donitaĵoj ja estas kolektitaj), kiel montras trarigardo de la kvara volumo de la impona 14-voluma eldono: plej gravas ne la parolantaro de lingvoj, sed la pristudo de etnaj grupoj. Tial ne eblas kontrasti tiujn donitaĵojn de 1989 kun pli modernaj. Tamen, se translingviĝo ne povas esti rekte observata kaj nombrata, transetniĝo klaras (vd. Grafikaĵo 1).



Grafikaĵo 1: Distribuon laŭ aĝoj de la proporcio de etnaj ĉuvaŝoj kaj etnaj rusoj en la urba loĝantaro de Ĉuvaŝio (Fonto: Popolnombrado 2002)

Se oni rigardas la distribuon laŭ aĝoj de la proporcio de ĉuvaŝoj kaj rusoj en la urba loĝantaro de Ĉuvaŝio, montriĝas, ke plimulto de la plej aĝaj urbanoj estas rusoj. Tamen, kiel rezulto de la migrado el la kamparo al la urboj, ĉuvaŝoj estis en 2002 plimultaj en ĉiuj aĝogrupoj sub 70 jaroj. Tiu plimulteco atingas maksimumon en la generacio de naskitoj meze de la 1960aj jaroj (ĉuvaŝoj 63,6% kaj rusoj 30,2% por la aĝogrupoj inter 35 kaj 39 jaroj), ekde kiam la proporcio de rusoj denove kreskas (ĉuvaŝoj 53,8% kaj rusoj 42,0% por la aĝogrupoj inter 0 kaj 4 jaroj).

Povas esti, ke la fondo de la satelita urbo de Ŝupaŝkaro, Ŝeĥe Ŝupaŝkar, efektive kaŭzis migradon en Ĉuvaŝion el aliaj regionoj de Rusio, sed samtempe ĝi plifortigis la procezon de urbigo de ĉuvaŝoj, sekve ni rajtas klarigi la disfalon de etnaj ĉuvaŝoj laŭ aĝogrupoj precipe per etna rusiĝo, des pli ekde la 1970a jaroj. Ĉi tiu estas eĉ rimarkinde rapida en la naskitoj ekde 1985.

Krome, ĉar la sama popolnombrado montras, ke nur 4,8% de ĉuvaŝiaj rusoj scipovas la ĉuvaŝan (kaj sendube temas plimulte pri vilaĝaj rusoj), ni komprenas, ke la procezo de transetniĝo estas samtempa aŭ nelonge posta al la procezo de translingviĝo. La donitaĵoj montras, do, ke en la 1990aj jaroj daŭris la procezo de lingvoanstataŭado atentigita en la laboraĵo de Baskakov kaj Nasyrova, eĉ verŝajne pligravigita: urbaj ĉuvaŝoj ne plu havas sian etnan lingvon kiel denaskan, sed ili krome malplimultiĝas, ĉar ili ankaŭ etne rusiĝas².

Indas substreki, ke lingvoanstataŭado rilatas al sintenoj de homoj al lingvoj, kaj tiuj sintenoj dependas de la spertoj (propraj aŭ ricevataj per onidiroj) de la homoj en rilato al la parolantoj de tiuj lingvoj. Kaj entute ili baziĝas sur rimarkinde universalaj kriterioj. Tabelo 3 prezentas ok faktorojn de prestiĝo aŭ malprestiĝo de afrikaj lingvoj, kies proksimeco al la ĉuvaŝa kazo en plejmulto da okazoj estas okulfrapa.

² Tio montras ankaŭ la maltaŭgecon labori pri lingvaj donitaĵoj praktike nur sur etnaj kadroj (kiel faras la popolnombrado de 2002 kaj la analizo de Baskakov kaj Nasyrova), ĉar procezoj maskiĝas. Krom tio, kiel ni vidos, tiu starpunkto implicite kontraŭas la Leĝon pri Lingvo de Ĉuvaŝio, por kiu la ĉuvaŝa ne devas esti lingvo nur de etnaj ĉuvaŝoj, sed de ĉiuj ĉuvaŝianoj (same kiel la rusa ne estas lingvo nur de etnaj rusoj): tiucele la Leĝo postulas ĝian devigan instruadon en ĉiuj edukejoj de Ĉuvaŝio.

	Malgranda prestiĝo	Granda prestiĝo
1	Parolataj en kamparaj regionoj	Parolataj en urbaj regionoj
2	Ligitaj al tradiciaj vivostiloj	Ligitaj al modernaj vivostiloj
3	Ligitaj al “malalta” tipo de ekonomio	Ligitaj al “alta” tipo de ekonomio
4	Ligitaj al eksmodaj ekonomiaj aktivaĵoj	Ligitaj al novaj kaj “modernaj” ekonomiaj aktivaĵoj
5	Ligitaj al tradiciaj religioj	Ligitaj al universalaj religioj
6	Statuso de malplimulto	Statuso de plimulto
7	Ligitaj al subordigita politika statuso	Ligitaj al politika dominado
8	Malmulte aŭ neniom uzataj en la formala instruado	Gravaj instruaj rimedoj

Tabelo 3: Faktoroj de prestiĝo en afrikaj lingvoj
(Fonto: Junyent 1992: 79–80, surbaze de Brenzinger k.a. 1991)

Do, ni povas konkludi, kiel faras Unesko (UNESCO 2009), ke efektive la ĉuvaŝa estas endanĝerigita. Se Unesko konsideras ĝin nur en la plej milda grado de endanĝeriteco, tio okazas nur pro la ankoraŭ relative granda nombro de ties parolantoj kaj, sekve, pro la pli grandaj ŝancoj por ĝia restariĝo. Tamen, se konsideri nur la tendencojn, ĝia situacio estas eble la plej malbona el ĉiuj aliaj tjurkaj rusiaj lingvoj kun pli ol 100 000 parolantoj. Tial ne eblas konsideri la falon de 1,4 milionoj da parolantoj en 1989 al 1,3 milionoj en 2002 (laŭ respektive la tiujaraj sovetia kaj rusia popolnombroj) kiel kaŭzitan nur de malfavora naskokvanto, sed ĉefe kiel komencon de lingvofalo.

Prave eblas oponi, ke multaj el tiuj donitaĵoj estas malnovaj. Ni poste vidos, ke verŝajne la tendencoj restis senŝanĝaj, malgraŭ jam dudeko da jaroj de oficialigo de la ĉuvaŝa lingvo, de lingvoleĝo en Ĉuvaŝio kaj de deviga instruado en la lernejoj. Tamen tio montras, kiel ni ankaŭ vidos, la gravan mankon de ĝisdataj donitaĵoj, kiuj malhelpas aŭ eĉ malebligas efektivan lingvopolitikon.

Aliflanke, dum diskutado de tiuj informoj kun fakuloj pri la ĉuvaŝa mi sentis ian relativigon de la graveco de la donitaĵo pri manko de ĉuvaŝlingvanoj en la urboj: la ĉuvaŝan oni ja neniam parolis en urboj (aŭ almenaŭ en la lastaj jarcentoj). Tio estas prava, sed socioj ŝanĝiĝas: en 1926 nur 0,6% de ĉuvaŝoj el la Respubliko loĝis en urboj (Ivanov 2005: 222), sed en 2002 ili jam estis pli ol 50% kaj tiu proporcio ĉiam kreskas, malgraŭ la procezo de urba transetniĝo. Iam la profesio de la vasta amaso de la loĝantaro estis agrikulturistoj; nuntempe tiu okupo estas malplimulta kaj ĝia socia prestiĝo malalta. Certe parto de la revalorigo de la ĉuvaŝa lingvo fontos el revalorigo de la vilaĝoj kaj la vilaĝa socio, ĝisradike neniigitaj de jardekoj da politiko, en kiu investado en vilaĝoj proksimis al nulo. El la altigo de la vivnivelo kaj malkresko de la senlaboreco de vilaĝoj, sendube la ĉuvaŝa multon profitos. Simile, unu el la aksoj de la irlanda lingvopolitiko ekde la 1920aj jaroj estis la konservado de la irlanda kiel parola lingvo en tiuj areoj, kie ĝi plu estis la lingvo de la komunumo kaj, kiel diras Pádraig Ó Riagáin, “ĉar tiuj areoj staris inter la plej malriĉiĝintaj kaj foraj areoj en la ŝtato, tiu dimensio de la strategio rapide akiris la karakteron de ekonomi-disvolva programo” (Ó Riagáin 1997: 374).

Tamen en socio, kie jam pli ol duono de la individuoj estas urbaj kaj ĉefe kie la referencaj vivstilo kaj personoj estas urbaj, la ĉuvaŝa pluvidos nur se ĝi sukcesos fariĝi elemento de la ĉiutaga vivo de moderna urba socio. Sekve, ĝi ne estu precipe ligita al iuj certe estimindaj tradicioj kaj folkloro, sed gravas ke ankaŭ ekz. urbaj gejunuloj vidu en ĝi allogajn elementojn de la hodiaŭa mondo kaj nature uzu ĝin kiel identigan, kreaĵon kaj komunikan rimedon.

Pro tio ŝajnas ne nur grave garantii la intergeneracian lingvotransdonon, kiu perdiĝas kaj estas la esenca fonto de certeco pri la pludaŭro de lingvo, sed eĉ zorgi pri la reenkonduko de la lingvo en la ĉuvaŝan socion, kun speciala atento, sed ne nur, al la plej junaj generacioj.

3 La procezo de lingvonormigo

3.1 Komencaj konsideroj

Kelkaj komencaj konsideroj pri la procezoj de lingvonormigo estos verŝajne utilaj pro ne plene kongrua terminologio inter diversaj lingvoj kaj skoloj.

Ni konsideras lingvonormigon procezo larĝe transiranta la kodigon de lingvo kaj inkluzivanta ankaŭ tion, ke ĉi tiu kodo³ fariĝu norme uzata en difinita komunumo, tio estas, ke ĝiaj anoj spontane uzu ĝin en difinitaj kuntekstoj, ĉefe formalaj. Do, lingvonormigo estas precipe procezo de socia reorganizado. Kaj ĝi havas precizajn celojn: per ĝi regresa lingvo grandigas sian parolantaron, sian uzofrekvencon kaj siajn uzosferojn. Tamen devas esti klare dekomence, ke la celoj de la lingvonormigo ne estas la plibonigo de la stato de la lingvo mem, sed tiu de ĝiaj parolantoj kaj pli ĝenerale de la socio, en kiu ili vivas.

3.2 La modelo de Haugen

Eingar Haugen proponis en 1983 modelon, kiu fariĝis referenco pri la starigo de normlingvo (Haugen 2003). En 1996 Albert Bastardas prezentis iom reviziitan version de la modelo (Bastardas 2000: 96–106) kaj ĝin ni sekvas ĉi tie. La modelo dividas la procezon en kvar etapojn: 1) Elektadon (*selection*); 2) Kodadon (*codification*); 3) Socian disvastigon (Haugen: *implementation*; Bastardas: *Extensió de la competència i de l'ús*); 4) Funkcian ellaboradon (Haugen: *elaboration*; Bastardas: *elaboració funcional*). (Vd. Tabelon 4)

	Formo	Funkcio
Socio	1. Elektado a) Elektado de la baza(j) dialekto(j)	3. Socia disvastigo a) Diskonigo de la kodita lingvo b) Disvastigo de la uzado
Lingvo	2. Kodado a) Grafikado b) Gramatikado c) Leksikado	4. Funkcia ellaborado a) Terminologia modernigo b) Stila evoluigo

Tabelo 4: Fazoj de la lingva normigo laŭ la modelo de Haugen adaptita de Bastardas (Fonto: Haugen 1983: 275, adaptita surbaze de Lamuela 1994: 122 kaj Bastardas 2000: 96–106)

3.3 La elektado

La elektado konsistas en la elekto de unu aŭ pliaj geografiaj bazaj varioj por la kreo de la lingvonormo. Tiu paŝo tute ne estas duaranga afero, ĉar ĝi povas kaŭzi akran polemikon kaj

³ Mi uzas la terminologian distingon de Lamuela kaj Murgades inter kodlingvo kaj normlingvo:

[...] ni distingas la simple koditan lingvon disde la norma lingvo: ambaŭ estas referencaj lingvoj, sed la unua rolas eksplicite, sur la bazo nur de la aktivismo de iuj parolantoj, dum la dua tion faras implicite, kiel vario ĝuanta la maksimuman valoron en la socio parolanta la lingvon. (Lamuela k Murgades 1984: 79, n. 3)

Tiu oportuna distingo i.a. substrekas la socian aspekton de la starigo de normlingvo.

Simile, sekvante la uzadon de la nuntempa socilingvistiko —kvankam ne en Rusio— mi rezervas la historie uzitan terminon *literatura lingvo* ekskluzive por tiu lingvotavolo (aŭ fakte lingvotavolaro) uzata en beletra kaj karakterizata per sia granda ellaboriteco.

malfaciligi la sukceson de la procezo de normigado, kiel okazis ĉe la slovakaj (Hobsbawn 1992: 55). Ne ĉiam la normlingvo kreiĝas el unu sola centra baza vario, sed ĝi povas konsisti el kombino de diversaj varioj en pli aŭ malpli grandaj proporcioj, kiel aparte okazas en la t.n. *kompoziciaj normlingvoj*. La bazaj varioj povas eĉ aparteni al malsamaj lingvoj, kiel en la kazo de la filipina, la oficiala lingvo de Filipinoj, konstruita “sur la bazo de la tagala kompletigata per elementoj de aliaj lingvoj de la lando” (Boix k Vila: 1998: 297)⁴. Aliflanke, indas rimarki, ke la elekto de bazaj varioj ne okazas nur sur geografia bazo, sed ankaŭ socia: la esprimo “la angla de la reĝino” celanta difini modelan (britan) anglan sufiĉe okulfrape montras tiun aspekton.

3.4 La kodado

Post la elekto de la bazo, ekas longa kaj kompleksa procezo de redaktado de la propono de normlingvo: la *kodado*. Ekzemple, ĉe la kataluna, ĝi daŭris pli ol du jardekojn per la publikigo de *Normes ortogràfiques* [“Ortografiaj normoj”] (1913), *Diccionari ortogràfic* [“Ortografia vortaro”] (1917), *Gramàtica catalana* [“Kataluna gramatiko”] (1918) kaj *Diccionari general de la llengua catalana* [“Ĝenerala vortaro de la kataluna lingvo”] (1932). Aliaj procezoj estis pli malrapidaj kaj la normaj formoj ne estis eksplicitaj en referencaj verkoj, ĝis kiam ili delonge fariĝis larĝe komunaj en difinitaj medioj, kiel reĝaj kancelerioj, universitataj centroj aŭ influaj eldonejoj.

3.5 La socia disvastigo

Ĉiuokaze, la kodado de lingvo ne kuntrenas la ĝeneraligon de ties kono kaj la uzadon de tiu propono —la *socian disvastigon*. Tiel, dum la 19a jarcento kaj longe dum la 20a la edukistemoj estis la plej grandaj diskonigantoj de tiuj normaj varioj, sed ni rimarkas, kiel en la lastaj jardekoj la aŭdvidaj amaskomunikiloj fariĝis iliaj plej influaj disvastigantoj. Tiel okazis ankaŭ por la plej disvastiĝintaj eŭropaj lingvoj, kiuj tiam foje multobligis sian parolantaron: ekzemple en Francio “en 1789 50% de la loĝantaro tute ne parolis tion, kion ni nun konas kiel «la franca», dum nur 12%–13% «ĝuste» parolis ĝin, ne pli ol en la centra regiono de la lando” (Hobsbawn 1992: 60).

En tiu fazo Bastardas —sekvante Cooper (1989)— proponas distingi inter “la du bazaj aspektoj de la socia ekzisto de normlingvo: la scipovo kaj la uzado” (Bastardas 2000: 97 n. 67). En la hipotezo okazas, ke oni sukcesus diskonigi proponon de normlingvo tra la loĝantaro, se ĝi ne fariĝas efektive uzata en la socio, tio endanĝerigas la diskonigon, ĉar ekz. la infanoj en la lernejo (kaj la gepatroj en la hejmoj de tiuj lernantoj) vidus malmultan aŭ neniun utilon al tiu lernado, kaj ĝi riskus fariĝi malsukcesa pro manko de socia apogo, eĉ vekoj kontraŭstaron.

Ĉi tie staras gravega politika problemo en la lingvoplanaj procezoj: la difino de la uzoceloj. Kiel diras Lluís Vicent Aracil, “la normigado precipe konsistas en la ellaboro kaj starigo de sistemoj de normoj de lingvo-uzo” (Aracil 1986: 30, citita en Boix k Vila 1998: 315). Ĉi tiu tre tikla sed esenca aspekto de lingvonormigado estas bone diskutita en Boix k Vila. Laŭ tiuj aŭtoroj estas du ĉefaj kurentoj en lingvopolitiko. Unun heroldas Joshua A. Fishman, kaj ĉefe celas sociojn, kie la intergeneracia lingvotransdono estas interrompita:

Por Fishman, stabiligi iagradan diglosion estas granda sukceso por komunumoj, kiel la nord-kataluna, la algera, la okcitana, la sarda, la skot-gaela aŭ por miriada da etaj enmigrintaj komunumoj tra la mondo. Ĉi tiuj komunumoj ne devus klopodi akiri novajn sferojn de formala uzo, sed ili devus koncentriĝi en la pli ĉiutagaj sferoj kaj akcepti la sendisputan regadon de la “nacia” lingvo en la formalaj uzoj. La fiŝmana engrupa diglosio estas, do, iaspeca protekto: en intima rondo, la intima lingvo; ekstere, la formala lingvo.

Fakte Fishman konsideras, ke —ĉar la dulingvismon ĉiuj profitas (plimultanoj kaj malplimultanoj) kaj ke la batalo por la unulingveco de la malplimultanoj montriĝas tre ofte neebla—, preferindas certigi ian stabilan distribuon kaj adician

⁴ Kompreneble, tiuj elementoj multe superas, ekzemple, la multnombrajn grekdevenajn fakvortojn, kiun oni renkontas en la eŭropaj lingvoj aŭ el pruntvortoj el aliaj lingvoj —kiel nuntempe precipe el la angla— en la fakaj terminaroj.

dulingvecon prefere ol implikiĝi en konkurencon socian dulingvismon, kies rezultoj ne certas, kiu postulas grandan klopodon kaj entute montriĝos nesufiĉe sukcesa. (Boix k Vila 1998: 303)

En alia perspektivo, pli potencaj lingvokomunumoj, ofte ligitaj al naci-emancipigaj movadoj, havas multe pli ambiciajn perspektivojn. Boix k Vila, kiuj distingas inter socilingvistikaj kaj juraj celoj, taksas, ke la unuaj rangas laŭ la jena paletro:

1. *Minimuma socilingvistika celo: transpreno de ĉiuj uzosferoj fare de la eksa regresa lingvo interne de la parolkomunumo.*
2. *Meza socilingvistika celo: la minimuma celo kaj krome la dulingvigo de la alilingvanoj, t.e. sukcesi, ke tiuj, kiuj ne havas la subordigitan lingvon kiel denaskan lernu kaj uzu ĝin.*
3. *Maksimuma socilingvistika celo: la meza celo kaj krome la lingva (re)integriĝo de la alilingvanoj, t.e. igi ilin aktivaj membroj de la akceptanta parolkomunumo per la kreo de kondiĉoj, por ke ili adoptu la lingvon de la akceptanta komunumo kiel sian kaj transdonu ĝin al siaj gefiloj.* (Boix k Vila 1998: 321)

Iuj aspektoj de tiuj ĉi celoj riskas kolizii kontraŭ etikaj problemoj. Klaras, ke tiuj temoj estas politikaj kaj, en demokratiaj socioj, tiajn decidojn devas fari la civitanoj (kutime per siaj parlamentaj reprezentantoj): kvankam lingvoplanado estas mult-aspekta laboro de fakuloj, la gvidlinioj kaj superrigardo de la procezo devas ĉiam esti demokratia kaj ne lezi la rajtojn de malplimulto.⁵

3.6 La funkcia ellaborado

Ĉiuokaze, eĉ se oni iel sukcesas havi bone disvastigitan lingvon, pro tio, ke la socioj senĉese transformiĝas, precipe pro la senhaltaj teknologiaj, ideologiaj kaj estetik-komercaj novaĵoj, la normlingvo devas havigi al si ne nur grandan nombron da neologismoj, sed ankaŭ “la tutan lingvon kaj stilon ligitajn al la politik-administracia sfero de moderna socio —kiaj estas petskribo, rezolucio, dekreto, verdikto ktp.—, en la amaskomunikiloj —la novaĵoj, la sportaj dissendoj, la reklamoj, la ĵurnalisma lingvo ktp.—, en la sciencaj kaj teknologiaj sferoj ktp.” (Bastardas 2000: 105). Jen en kio konsistas la *funkcia ellaborado*.

Ne necesas, ke ĉi tiuj kvar etapoj estu plene sinsekvaj. Ekzemple, por la kataluna la socia disvastigado de la ortografiaj normoj komenciĝis, dum oni kodigis la leksikon. Pli klare: por ekuzi la lingvon en novaj uzosferoj necesas funkcia elaborado; sed funkcia elaborado fakte ĉefe ŝprucas el praktika uzado de la lingvo en tiuj sferoj — la du procezoj montriĝas, do, intime ligitaj.

3.7 Taksado kaj akceptado

Sekvante Bastardas (2000: 106), oni aparte insistu pri la neceso de *taksado kaj akceptado* laŭlonge de ĉiuj fazoj de la procezo. Ĝi celas la analizon de la akcepto aŭ la malakcepto fare de la lingvokomunumo de la diversaj etapoj kaj subetapoj de la modelo: la procezoj de lingvonormigo estas longaj, la socioj estas ekstreme kompleksaj kaj krome ŝanĝiĝantaj, la lingvoplanistoj ne regas ĉiujn elementojn influantajn en la lingvoprocezoj kaj krome ne malofte aperas neatenditaj kromefikoj (favoraj aŭ malfavoraj). Atenta sekvado kaj analizo de la rezultoj de la procezo estas plene necesaj. Ĉar tio postulas specifajn agadojn, ni pritraktos ĝin memstare.

4 La elektado kaj la kodado en la ĉuvaŝa lingvo

Por la ĉuvaŝa lingvo eblas aserti, ke la ellaborado de kodita lingvo startis en 1871 per la starigo de ortografia normo fare de Ivan Jakovlev (1848–1930), tiam junega iniciatinto de lernejo en Simbirsk. La sekvan jaron li eldonis la unuan lernolibron (*Bukvar' dlja ĉuvaŝ*), kiun ni povas

⁵ Pri tiaj aspektoj estas aparte interesaj la verkoj de Will Kymlicka (ekz. Kymlicka 1995) kaj Albert Branchadell (ekz. Branchadell 2005).

taksi kiel embrion de ĉuvaŝa gramatiko. Li elektis sian propran dialekton, la sudan (*anatri*), kiel bazon de la kreata kodita lingvo. Tio ŝajnas logika ankaŭ pro tio, ke ĝi estas la plej disvastiĝinta kaj ankaŭ tiu de la regiono ĉirkaŭ la unua kultura ĉefurbo de ĉuvaŝoj (eventuale, post la Bolgara Ĥanejo): Simbirsk. Pri la grandega influo de Jakovlev kiel pedagogo, unue en sia propra lernejo —kiu ekde 1890 fariĝis instruista lernejo— kaj poste per reto de ĉuvaŝaj lernejoj, atestas la pli ol 1000 diplomitaj instruistoj, kiuj estis liaj disĉiploj (Kurakov 1997: 11). Baldaŭ aperis diversaj literatur-kreantoj kaj gazetoj, la kodlingvo disvastiĝis.

Tiu disvastigo estis helpata de frusovetia politiko de *korenizacija* (radikiĝo), sed la firmigo de Stalino en la potenco portis por la ĉuvaŝa, kiel por preskaŭ ĉiuj lingvoj de naciaj malplimulto en Sovetio, radikalan ŝanĝon. La ortografion starigitan de Jakovlev oni modifis en 1933 por konsiderinde proksimigi ĝin al la rusa per la aldono de literoj kaj distingoj fremdaj al la ĉuvaŝa lingvo, sed ekzistantaj en la dominanta rusa. Tiel oni aldonis literojn por la sonoj [b], [d], [g], [z], [ʒ], [f] —ĝis tiam fremdaj al la ĉuvaŝa fonologia sistemo. La alfabeto ordo fariĝis la rusa. Iom poste, en 1938, nova ortografia reformo eĉ pliproksimigis la ĉuvaŝan ortografion al la rusa. Malaperis kvar literoj identigitaj palatalajn sonojn kaj oni enkondukis la rusan sistemon de duopaj vokalaj simboloj por indiki palataligon: tiel do aperis la paroj а/я, э/е, о/ё, у/ю, same kiel la palatalaj simboloj ь kaj ъ. El tio sekvis ankaŭ, ke la literon е, se ĝi ne staras antaŭ konsonanto, legiĝas /je/, kiel en la rusa, anstataŭ /e/. Oni krome aldonis la ceterajn konsonantojn de la rusa, kiel ц kaj щ (Petrov 1980: 140-173). (Tabeloj 5 kaj 6 prezentas la ŝanĝon en la alfabetoj.)

а а̣ у у̣ ы ы̣ е ẽ ẹ̃ ь ь̣ і і̣ ј ј̣ к л л̣ м н ң ь р с с̣ ш ш̣ в х т ʈ ʈ̣ ʃ ʃ̣

Tabelo 5. Jakovleva alfabeto (Petrov 1980: 163)

а а̣ б б̣ в в̣ г г̣ д д̣ е ẽ ẹ̃ ж ж̣ з з̣ и и̣ й й̣ к л л̣ м м̣ н н̣ о о̣ п п̣ р р̣ с с̣ т т̣ у у̣ ʃ ʃ̣ ф ф̣ х х̣ ц ц̣ ч ч̣ ш ш̣ щ щ̣ ы ы̣ ь ь̣ э э̣ ю ю̣ я я̣

Tabelo 6: Hodiaŭa ĉuvaŝa alfabeto (Petrov 1980: 171)

Aldone sekvis eksplicitaj lingvorusigaj politikoj. Henze klarigas: “Baldaŭ reguliĝis, ke ĉiujn rusajn pruntvortojn oni devis skribi ekzakte kiel en la rusa (Henze 1977: 383, citita de Sebba 2006: 104). Sebba substrekas, ke tio okazis “eĉ kiam iagrada fonologia adapto estis antaŭvidebla. Ĉi tiu praktiko ebenigis la vojon por amasa enportado de rusa leksiko, senadapta, en la tjurkajn lingvojn kaj estis konsiderata pozitiva atingo, sukcesita atentante la lingvistikajn principojn” (Sebba 2006: 104; vd. ankaŭ Comrie 1981: 34, Crisp 1989: 33–34). Deŝeriev (1983: 444–445), ekzemple, “neas [...] la aŭtonomecon en la kreado de neologismoj en la minorigitaj lingvoj de Sovetio kaj pravigas la amasajn pruntojn el la rusa per la simplisma preteksto, ke la ankaŭ angla posedas leksikon grandparte konsistantan el pruntvortoj” (Castellanos 2000: 70). En tia medio la kreado de neologismoj per aliaj rimedoj —ekz. per paŭsado aŭ per prunteprenado el aliaj lingvoj, kiel el la turka— estis neantaŭvidebla kaj certe suspektinda de mallojaleco al la sovetia reĝimo. Videbla rezulto de tiu politiko estas, ke ekde la 1930aj jaroj la diversaj aperantaj ĉuvaŝaj vortaroj sinsekve aldonis pli kaj pli da rusaj pruntvortoj, kiuj ne nur kovris novajn fakojn —ekz. administracian lingvon—, sed ili ankaŭ ofte aldoniĝis kvazaŭ sinonime al heredaj vortoj (Petrov 1980: 123–127). El tio sekvis fonologiaj distordoj, kiel la aldono de novaj fonemoj, la enkonduko de fremdaj silabstrukturoj, la malobservo de la vokalharmonio k.a. Samtempe la pli kaj pli granda aktiva kaj pasiva spertado de la rusa lingvo igis, ke en la parola ĉuvaŝa rusaj vortoj ekuziĝis grandkvante. Ne malofte la ĉuvaŝlingvanoj sentas malkomforton kaj iagradan kulposenton pro la rusigita idiomato ĝenerale uzata, kio malpliigas la prestiĝon de la ĉuvaŝa⁶.

⁶ Similaj okazoj estas raportataj en multaj landoj kiel kontribuantoj al la lingvoforlaso kaj lingvomorto. Ekz. “kvankam la sinteno de la loĝantoj de Tlaxcala pri la nahuatla ne estas negativa —ili fieras pri ĝi kaj konsideras ĝin bela—, la fakto, ke eniris en ĝin tiom da hispanaj vortoj (ĉ. 40% de la vortoj en ĉiutaga konversacio) kaŭzas, ke la parolantoj kredas, ke ne plu indas ĝin paroli. Neeviteble, tiel granda kvanto da

Kompreneble ekde la mezo de la 1980aj jaroj, danke al la liberaligo de la sovetia reĝimo konata sub la nomo *perestrojko*, ekestis logika deziro elpurigi la leksikon de la ĉuvaŝa, sekve eblas paroli pri nova fazo en la difino de la kodlingvo. Kiel ĉiam en tiuj procezoj tio levas tiklajn diskutojn, ne malofte pasiajn.

La unua aspekto estas la *grafikado*, t.e. la elekto de la ortografia sistemo. Kiel diras Castellanos “La grafikado estas la aspekto de kodado posedanta la plej grandan ŝarĝon simbolan kaj referencan, ĉar la identecon de grafika sistemo reflektas la elekto de specifaj grafikaj simboloj” (Castellanos 2000: 56). Pro tio ĝi “ofte situas en la centro de la polemiko pri normigado” kaj “ĝi povas suferi diversajn fenomenojn de obstrukco kaj deformado” (Castellanos 2000: 60). Castellanos montras diversajn kazojn de grafikado kun “asimilismaj kaj religiaj celoj” kaj trastudas la problemojn de grafikado en la starigo de diversaj normlingvoj (Castellanos 2000: 55–65). Sub tiu lumo, la Jakovleva sistemo montriĝas ideala, kvankam verŝajne ne plene restarigebla, dum la ankoraŭ uzata stalinisma skribsistemo ŝajnas danĝera distordo postulanta reformojn. Tio, ke ĝi estas ankoraŭ senŝanĝe uzata 25 jarojn post la komenco de perestrojko montras la malforton de la hodiaŭa ĉuvaŝa lingvonormiga procezo.

La sekva fazo de la kodprocezo, *gramatikado*, t.e. la elekto de la morfosintaksaj elementoj de la normlingvo, estis malpli interferata de la stalinisma lingvopolitiko kaj ĝuis la avantaĝon de la lingva distanco inter la subordigita kaj la dominanta lingvoj, sekve ĝi ne ŝajnas prioritata en la hodiaŭa diskuto pri (re)normigado de la ĉuvaŝa lingvo.

La lasta el la tri procezoj de lingvokodado estas la *leksikado*, t.e. la elekto de la vortaro de la normlingvo. En procezoj kiel la nuna en la ĉuvaŝa, la elekto de ora mezo inter klasika lingvo — sentata kiel pura, sed arkaika— kaj parola lingvo —sentata kiel malpura mikso, sed hejma kaj viva— estas malfacilega tasko por ĉiuj lingvokodantoj. Estas fakte esenca diferenco en la sento pri pureco de la lingvo inter dominantaj kaj subordigitaj lingvoj. En la ĉuvaŝa, kiel en aliaj okazoj, ŝajnas, ke estus prioritare klopodi elpurigi la vortojn kontraŭstarantajn la fonetikon de la lingvo (ekz. la lavangon de rusismoj en la administracia lingvo kiel *respublika* aŭ *ministerstvo* kun fremdaj sonoj kaj silabstrukturoj) kaj jen adapti ilin al la spirito de la lingvo (t.e. uzi la efektivan prononcon de parolantoj ne plene interferataj de la rusa fonetiko), jen provi enkonduki neologismojn surbaze de elementoj de la propra lingvo (ekz. per paŭsado de aliaj lingvoj, ne nepre de la rusa).

Fakte senfinas la ebloj en la kreo de kodlingvo. Praktike ĉiuj starpunktoj estas akcepteblaj, kvankam iuj antaŭvideble pli trafe kondukos al la normaligo de la uzado de la lingvo, kiu estas pli grava celo. Esencas, do, la unueco de kriterioj, por ne krei disbatalantajn kodlingvojn, riskantajn endanĝerigi la procezon (kiel ekz. en Galegio).

5 La socia disvastigo

La socia disvastigo, do, estas la ŝlosila elemento de la tuta procezo de lingvonormigado: la transiro de kodlingvo al efektive ensociigita, funkcia, uzata lingvo. Kiel vidite, indas distingi inter du interdependaj procezoj: la diskonigo de la kodlingvo al la socio —do ĉio rilatanta al la kapablo uzi la lingvon— kaj ties ĉi efektiva uzigo. Tamen antaŭe indas havi enkape, kiajn uzosferojn ni celas por tiu ĉi lingvo: ĉu ekz. ĝi estu familia lingvo herede transdonata interne de sia lingvogrupo kaj uzata nur por engrupaj parolaj kontaktoj, aŭ ĉu ekz. ĝi fariĝu komuna lingvo de la tuta socio, kie oni alvenu al tia grado, ke homoj, kvankam ili eble ne uzas ĝin hejme, alparolu en ĝi nekonatan en kiu ajn okazo surstrate, en vendejo aŭ en laborejo, kutime legu gazetojn, spektu televidon ktp. Por kompreni kian vojon donis al si la ĉuvaŝan socion, ni turnu nin al la leĝaj tekstoj.

pruntvortoj konsiderinde malfortigas unu el la plej gravaj funkcioj de la nahuatla: la memidentigo kiel indiano.” (Junyent 1991: 59 laŭ Hill k Hill 1977).

5.1 La ĉuvaŝiaj bazaj leĝaj tekstoj pri lingvoj

Por tiu celo ni analizu unue du fundamentajn tekstojn: la Konstitucion de la Ĉuvaŝa Respubliko, kun siaj lastaj amendoj en la 5a de oktobro 2006 (Ĉuvaŝskaja Respublika 2006) kaj la leĝon de la 25a de novembro 2003 pri lingvoj en la Ĉuvaŝa Respubliko (Ĉuvaŝskaja Respublika 2003).

La respublika Konstitucio tuŝas lingvon en kvin artikoloj. En artikolo 8 ĝi deklaras, ke “la ŝtataj lingvoj de la Ĉuvaŝa Respubliko estas la ĉuvaŝa kaj la rusa lingvoj”. Artikolo 17 garantias la egalrajtecon de homoj sendepende de “sekso, raso, nacieco, lingvo, deveno” k.a. Artikolo 23 garantias la liberan elekton de lingvo por “komunikado, edukado, lernado kaj kreado”. Artikolo 26 malpermesas la “propagandon pri milito, pri socia, rasa, nacia, religia aŭ lingva supereco”. Fine artikolo 92, ke “procesado kaj juĝdokumentado en ĝeneralaj juĝejoj estas farataj en la rusa aŭ en la ĉuvaŝa kaj rusa lingvoj. En la Arbitracia kortumo de la Ĉuvaŝa Respubliko ili estas farataj en la rusa lingvo”.

Do, en tio, kio rilatas la ĉuvaŝan lingvon, la respublika Konstitucio donas al ĝi egalan nivelon al la rusa lingvo —eĉ citas ĝin unualoke—, krom en la sfero de justico.

Tamen deklarado pri “oficialeco” aŭ “nacieco” de lingvo povas fariĝi nur bonvola esprimo. Kiel tio efektiviĝos en la agado de la Respubliko principe difinas la leĝo pri lingvoj, tamen ĝi restas ne multe pli ol deklaro pri altaj valoroj de la ĉuvaŝa lingvo kaj de dulingveco en la enkonduko de la leĝo. En tio, kio rilatas la artikolojn specife favorantajn la ĉuvaŝan lingvon, ni trovas artikolon 7, laŭ kiu “en ĉiuj alilingvaj edukaj institucioj de la Ĉuvaŝa Respubliko la ĉuvaŝa estos instruata kiel stud-objekto”; artikolon 12, laŭ kiu i.a. ĉiuj registaraj kaj neregistaraj blanketoj devas esti minimume en la ĉuvaŝa kaj rusa lingvoj; kaj artikolon 20, laŭ kiu la ĉuvaŝa kaj la rusa devas esti uzataj en skribado de loknomoj i.a. en vojoj. Menciindas ankaŭ artikolo 17, laŭ kiu komercaj firmaoj ne estas rajtigitaj rifuzi servon pro manko de lingvokono, kion eblas kompreni kiel plifortigon de la deklaro en artikolo 4, ke “kono aŭ nekono de lingvo ne povas kaŭzi la limigon de lingvaj rajtoj de civitanoj de la Rusia Federacio”.

Entute ni rimarkas, ke la leĝo provas ege zorge trakti la ĉuvaŝan lingvon je la sama nivelo de la rusa, kvazaŭ timante ian ajn malegalan (sed egaligan) pozitivan agon favore al ĝi, kaj aparte atentigas diversloke pri eventuala senigo de rajtoj de rusiaj civitanoj pro iaspeca lingvotrudo. Nur unu ago principe malegalas favore al la ĉuvaŝa lingvo: ĝia deviga instruado en la lernejoj (kvankam, denove, ne temas pri malegaleco, ĉar la instruado de la rusa estas certigita per la t.n. Ŝtataj Instruaj Normoj). Eventuala rajto de la civitanoj esti parole priservataj de la administracio en la ĉuvaŝa lingvo ne estas klare vortumita. Mankas devigo al vendejoj —aŭ ekz. specife al grandaj magazenoj lastatempe multobliĝantaj en la ĉefurbo— aperigi siajn afiŝojn ankaŭ en la ĉuvaŝa, aŭ al restoracioj havi siajn menuojn ankaŭ en ĝi. Kaj, efektive, la ĉuvaŝa estas plene neglektata de komercaj entreprenoj. Tamen la leĝo ŝajnas postuli ion multe pli malfacile enkondukeblan kaj certe ne efektivigatan: la parolan priservadon en la komercejoj. Indas konsideri, ke la etnaj rusoj konsistigas ĉ. 40% de la urba loĝantaro kaj ke malpli ol 5% el ili parolas la ĉuvaŝan (laŭ la popolnombrado de 2002).

Entute la bildo projekciata de la lingvoleĝo ne estas tiu de efektive dulingva egalisma socio. Ĝia enkonduka ekzaltado de la ĉuvaŝa lingvo kiel “esenca nacia identigilo kaj bazo de la tuta spirita vivo” kontrastas kun la malfirmeco en la artikolara konkretigo pri ĝia diskonigo ekster la lerneja kadro kaj pri la instigado de ĝia socia uzado.

Ĉiuokaze, iom pli antaŭen iras la Respublika Programo pri la efektivigo de la lingvoleĝo de 2003 ĝis 2012, laŭ dekreto n-ro 314 de 6 de decembro 2002 kaj plurfoje amendita de tiam —la lastan en la 28 de julio 2008 (Ĉuvaŝskaja Respublika 2008a). Tamen tiu dokumento konsistas ne pli ol el longa listo de sendube interesaj agadoj sur tre diversaj sferoj, tamen sen konkretigo de datoj de efektivigo aŭ de investotaj rimedoj por ili.

Unu el la malmultaj konkretigoj de la programo estas la jara buĝeto por la leĝ-efektivigo: entute 93,8 milionoj da rubloj tre malregule distribuitaj laŭlonge de dek jaroj. Por 2009 estas buĝetitaj 1,7 milionoj da rubloj (Ĉuvaŝskaja Respublika 2008a: 10, 2008b: 17), t.e. 0,006% de la 27,7 miliardoj da rubloj de la Respublika buĝeto por la jaro (Ĉuvaŝskaja Respublika 2008e). Klaras,

ke la ĉuvaŝa lingvo ne estas prioritato por la ĉuvaŝa registaro⁷. Fakte, kiel estas cetere tute logike, ne la tuta sumo buĝetita por la efektivigo de la lingvoleĝo devenas el la respublika buĝeto, sed oni antaŭvidas ankaŭ aliajn fontojn. Tamen, iom mirinde, estas antaŭvidata neniu enspezo el internaciaj fondusoj.

Entute, evidentiĝas, ke la ĉuvaŝa leĝaro pretendas samtempe instigi du parte kontraŭstarantajn principojn: la plenan socian dulingvismon kaj la plenan individuan dulingvismon. La plena administracia dulingveco disponiganta egalece du lingvojn fakte permesas la individuan unulingvismon: en tia situacio ĉiu homo povas en ĉiu okazo uzi sian propran lingvon; sed male, la unulingveco de la administracio puŝas la alilingvanojn al dulingviĝo. Fakte, la praktiko de la nedisponeblo de la propra lingvo por spertigi al la loĝantaro alian lingvon kaj faciligi ĉi ties lernadon estas abunde praktikata en multaj ŝtatoj per la televida dissendado de filmoj en la originala lingvo (t.e. praktike en la angla pro ĝia fakta monopolo de la internaciaj merkatoj). Ekzemple, eskuzivan, kvankam nur simbole, uzadon de la regresa lingvo oni povus senprobleme enkonduki per ekskluziva uzado de ĉuvaŝaj nomoj por la ĉefaj institucioj de la Respubliko, sed tia agado ŝajnas kontraŭstari la pli esencan principon, implicitan en la leĝaro, de plena lingvoegaleco inter la du oficialaj lingvoj: socia dulingvismo superfortas individuan dulingvismon. Kaj la timo rompi tiun principon ŝajne kaŭzas la mankon de pozitivaj agadoj (*pozitiva diskriminacio*) por la ĉuvaŝa lingvo.

Entute ne klaras, kiel situacion de enorma diferenco de publika disponeblo kaj uzado inter la ĉuvaŝa kaj la rusa lingvoj oni pretendas egaligi. Tial mankas akcento sur firma apogo de ĉuvaŝlingvaj aŭdvidaj amaskomunikiloj —gravegaj por la hodiaŭa socio— kaj aparta zorgo pri la infanoj, por ke ili efektive trovu elementojn por uzi kaj pliprofundigi siajn lingvajn konojn. Kaj —verŝajne pro politikaj kialoj— la registaro preferas ne agnoski la perdon de la intergeneracia lingvotransdono kaj akcenti la registarajn programojn pri ĉi tiu esenca fakto por la lingvo, sekve tiaj agadoj estas tute preteratentataj de la ĉuvaŝa leĝaro kaj ties realigaj programoj

Konklude, ni povas diri, ke la leĝaro de Ĉuvaŝio proklamas sian deziron plene dulingvigi la socion, kvankam montriĝas manko de registara engaĝiteco efektiviĝi tiun celon.

5.2 La diskonigo de la kodita lingvo

5.2.1 La stato en Ĉuvaŝio

Entute, do, la registaro de la Respubliko bazas la diskonigon de la ĉuvaŝa lingvo en la instruisistemo. Kvankam efektive televido en la lastaj jardekoj fariĝis eksterordinare influa por la lingvotransdono, sendube la lerneja sistemo plu estas esenca por la kono kaj uzado de la lingvoj en la dulingvaj komunumoj. Henrique Monteagudo (2008) tre trafe resumas ĝiajn ŝlosilajn punktojn:

- (1) La dulingvaj eduisistemoj estas ne malriĉigaj, sed riĉigaj por la gelernantoj, sekve oni ne devas timi la enkondukon de plia pera lingvo en la lerneajn programojn.
- (2) Ne ekzistas alia eblo por certigi la minimuman konon de la subordigitaj lingvoj, krom ilia ĝenerala uzado kiel pera lingvo en la elementa kaj meza lernejoj, dum la lernado de la dominanta lingvo estas superabunde apogata per ĝia ĉiea ĉeesto en la amaskomunikiloj kaj en la ĝenerala socia vivo.
- (3) La minimuma kapablo de la loĝantaro en la du lingvoj estas la ununura garantio por la efektiva kunoficialeco de ambaŭ, por la egaleco de ŝancoj en la eduka kaj labora sferoj kaj por la unueco de la koncernaj socioj.

La kuranta respublika Leĝo pri Edukado estas de la 28a de januaro 1993, laste amendita en la 15an de novembro 2007 (Ĉuvaŝskaja Respublika 2007). Praktike nur ĝia sesa artikolo pritraktas lingvajn aferojn. Ĝi esence deklaras, ke “la Ĉuvaŝa Respubliko garantias krei kondiĉojn por la

⁷ Ne ĝustus aldoni ekz. la elspezojn pri la instruado de la ĉuvaŝa lingvo en la lerneja sistemo kiel parton de la investoj por la efektivigo de la lingvoleĝo, same kiel ne tiujn de la instruado de aliaj lingvoj (rusa, angla ktp): lingvoinstruado estas integra parto de la ĝeneralaj celoj de klerigo, sekve ili iel ajn okazus.

antaŭlerneja, ĝenerala elementa, baza ĝenerala edukado en la rusa kaj ĉuvaŝa lingvoj, kaj en areoj loĝataj de aliaj naciecoj en iliaj lingvoj”.

Se konsideri la antaŭlernejan sistemon, ĉuvaŝlingvaj infanĝardenoj efektive ekzistas —ilin frekventis ĉ. 35% de la enlernejigitaj infanoj en 2000 laŭ registaraj fontoj (Ĉuvaŝskaja Respublika 2000), sed ili estas distribuitaj ekskluzive en vilaĝoj. En la ĉefurbo ekzistas eĉ ne unu infanĝardeno, en kiu la ĉuvaŝa lingvo estas la pera lingvo, normale uzata (laŭ parola konfirmo de la Oficejo pri Antaŭlerneja Edukado de la kvartalo Lenino, aŭgusto 2009). Tio montras registaran malzorgon ne nur pri la principe celata efektiva dulingveco de la urbaj ĉuvaŝianoj, sed eĉ neglekto de la rajtoj de la urbaj ĉuvaŝlingvanoj aŭ de tiuj dezirantoj, ke iliaj gefiloj efektive posedu la ĉuvaŝan. Sed samtempe, tio montras ankaŭ la malforton, mankon de organizateco kaj erarajn prioritatojn de la neregistara movado por la ĉuvaŝa lingvo, kiu ne mem organizis privatan reton de antaŭlernejoj kaj lernejoj, analoge al tio, kio de pluraj jardekoj okazas ekz. en Francio ĉe bretonoj, okcitanoj, eŭskoj kaj katalunoj.

La sama afero okazas en la elementa kaj meza lernejo: en la ĉefurbo la ĉuvaŝa lingvo estas instruata nur kiel stud-objekto de la 1a ĝis la 9a klaso, po tri horoj en semajno. Tamen la lingvokapabligo estas tre malkontentiga: la vasta plimulto de la lernantoj venas kun neniuj konoj de la ĉuvaŝa kaj montriĝas, ke la ekzistantaj lernolibroj kaj lernometodoj ne sukcesas multon. Ankaŭ la kvanto de horoj malebligis tiun kapabligon, sed krome indas konsideri la ĝeneralan mankon de pozitiva sinteno (kaj la ne maloftan ekziston de negativa) pri la klasoj pri la ĉuvaŝa lingvo ĉe la gepatroj. La opinio de eksaj lernantoj trapasintaj tiun edukadon estas tre ofte tiu de “plena tempoperdo” (laŭ miaj personaj intervjuoj al urbanoj trapasintaj tiujn kursojn). Sincere dirite, ili rajtas tiel plendi: kiel taksi la multjaran, sed ne efikan, instruadon de lingvo, kiu ne akiras samtempe socian kaj ekonomian valoron? La deviga instruado de lingvo povas montriĝi eĉ kontraŭa al ĝi, se ĝi vekas iritiĝon kontraŭ ĝi pro sia neefikeco. Ĝi ne estu nur registara kaj socia alibio pri tio, ke “ni agas por la ĉuvaŝa” aŭ eĉ “ni faras ĉion eblan por la ĉuvaŝa”. Fakte la instrusistemo mem agnoskas sian nekapablon instrui la ĉuvaŝan lingvon, kiam en la 10a kaj 11a klasoj la stud-objekton “ĉuvaŝa literaturo” oni instruas en la rusa kaj tekstoj estas legataj traduke: tio estas neimagebla en aliaj landoj por la instruado de kiu ajn fremda lingvo, ekz. de la angla (oni eventuale uzas simpligitajn tekstojn, sed ne tradukojn).

Laste, en la universitatoj la uzo de la ĉuvaŝa estas neekzistanta krom pri la fakoj specifaj pri ĝi, kiel ĉuvaŝa filologio. Por komparo, lingvokomunumo kun malpli da parolantoj, kiel la eŭska, havas sufiĉe larĝan elekteblon de universitataj fakoj lerneblaj en ilia lingvo.

Entute montriĝas gravaj miskomprenoj en la instruado de la ĉuvaŝa lingvo en la lernejo:

- (1) Malsama lingva medio postulas malsamajn pedagogiajn rimedojn. Ne estas same instrui la dominantan rusan lingvon ĉie regantan en la urboj (kaj ankaŭ en multaj esencaj sferoj de la vilaĝa vivo), ol la subordigitan ĉuvaŝan, plej ofte plene ne konatan de urbaj infanoj kaj kun malmulte da kontakto kun ĝi, krome ofte kun pli-malpli gepatra manko de instigo aŭ eĉ kontraŭstaro. Samtempe ne estas same instrui la enlandan ĉuvaŝan lingvon, ĉie aŭdatan eĉ en la urbo, ol ekz. la anglan lingvon, plene fremdan, tamen tre prestiĝan kaj facile renkonteblan (kaj renkontatan) el la propra hejmo per televido kaj interreto.
- (2) Instruado de la subordigita lingvo povas havi malsamajn prioritatojn ol tiujn de dominantaj: laŭ la socilingvaj cirkonstancoj eble indas ĉefe celi la komprenon de la lingvo kaj dualoke ĝian aktivan parolkapablon, dum legoskribado de la norma vario povas veni en dua fazo, kiam la socilingva medio pliboniĝos parte danke al la komprena kaj parola kapabligo de la novaj generacioj.⁸

⁸ Ekz. praktike Luksemburgo akceptis la situacion de diglosio por la luksemburga lingvo. La luksemburga estas la pera lingvo de instruado en la tri jaroj de la infanĝardeno kaj dividas tiun rolon kun la germana en la du unuaj jaroj de la elementa lernejo, post kiam ĝi fariĝas stud-objekto, unu horon en la semajno, ĝis la 13a jaraĝo de la gelernantoj (Horner k Weber 2008: 89).

- (3) Malsamaj socilingvaj cirkonstancoj postulas malsamajn pritraktojn en la lernolibro: ekz. en la okcitanlingva lernolibro *Diga-me, diga-li* (Carles 1986) ĉefrolas la interago inter infanoj kaj geavoj, ĉar unuflanke tio pli bone spegulas la lingvo-uzon kaj aliflanke tio ankaŭ instigas al tiuj interagoj, por la refamiliigo de la lingvo trans perdita(j) generacio(j).
- (4) Lernolibroj devas iagrade speguli socion, sed ili ne devas pliampleksigi kliŝojn. Ili devas ankaŭ doni pozitivan bildon: same kiel ili ne devas reprodukti ekz. la kontraŭinan kaj kontraŭegan diskriminaciojn regantajn en niaj socioj, necesas prezenti en ili pozitivajn bildojn de uzado de la subordigita lingvo.
- (5) La temoj de la lernolibroj devas, en konsento kun la aĝo de la lernantoj, tuŝi plene normale ĉiujn temojn vekantajn la intereson de la gelernantoj en normala, moderna, disvolviĝinta socio.
- (6) La minoritateco de la lingvo montriĝas aparte taŭga por fokusigi la atenton de la gelernantoj pri lingvoj kaj, aparte en la lastaj kursoj, instigi ilian pripensadon pri sociaj aspektoj de lingvoj per analizado de ilia ĉirkaŭo. La lernantoj povos tiel kompreni, ke la dulingvismo en la mondo ne estas escepta, sed unulingvismo; studi kiel kaj kial lingvoj daŭre vivas aŭ malaperas; analizi konceptojn kiel diglosion, individuajn dulingvismon kaj socian dulingvismon; enprofundiĝi en la konsekvencojn de la ekzisto de unulingvuloj en dulingva socio; diskuti pri la lingvaj rajtoj kaj devigoj de la civitanoj, de la administracio kaj de la entreprenoj lerni pri pozitivaj dulingvaj spertoj en i.a. Kebekio, Galegio, Eŭskio, Kimrio, Tanzanio, Nov-Zelando; ktp. Tia analizo kreas civitanojn pli respondecajn pri siaj lingvaj sintenoj kaj agoj, kaj samtempe pli postulemajn pri siaj rajtoj (sendepende de ilia denaska lingvo)⁹.
- (7) La instruado de la ĉuvaŝa lingvo devas esti konceptata kiel integra parto de la instruprogrameco, kaj aparte de la instruado de lingvoj, kune kun la rusa kaj la fremdlingva instruado. La lernejoj lingvoinstruistoj devas organizi sin por dividi inter si la multan komunan materialon kaj uzadi pozitivajn transferojn inter lingvoj por eltiri la maksimuman profiton de la lernejoj instru-horoj: se la pedagogiaj metodoj estas bone adaptitaj, kiam oni instruas la ĉuvaŝan, oni instruas ankaŭ valorajn elementojn por la rusa; kaj same en la mala direkto.
- (8) Lernolibroj kaj la lerneja sistemo entute devas kontribui al la vastigo de la uzosferoj de la lingvo. Lingvoj vivas kaj normaligeblas per sia uzado. Kiam oni ekz. spektas filmon en dominanta lingvo (ekz. en la rusa) oni preteratentas tiun fakton kaj sekvas la fadenon de la rakonto, eĉ se en ĝi estas malverŝajne, ke en la koncerna kunteksto la uzata lingvo estus tiu (ekz. gangsteroj en Ĉikago); tamen tiu sento estas tute alia la unuajn fojojn, kiam oni spektas filmon en subordigita lingvo (ekz. en la ĉuvaŝa): tiam la lingvo fariĝas centro de atento. Tamen tiu sento malaperas per normala, daŭra, multsfera uzado de la lingvo.

⁹ Tio ĉi povus fariĝi la bazo ankaŭ de la deviga kurseto pri la ĉuvaŝa lingvo, kiun devas ricevi ĉiujn studentojn en Ĉuvaŝio. La diverseco de niveloj igas tiujn klasojn apenaŭ eblaj, krom tio, ke la malmulto de instruistoj permesas apenaŭ lingvokapabligon por nesciantoj. Aliflanke la pripensado pri sociaj realaĵoj estas pli proksima al la interesoj de studentoj kaj la influo en sintenoj, kiujn certe alportus tia pripensado, helpus i.a. la ege endanĝerigitan lingvotransdonon de ĉuvaŝlingvaj studentoj al la sekva generacio kaj la akiron de pli pozitiva gepatra sinteno por la lerneja instruado de la ĉuvaŝa en la sekva generacio. En Katalunio socilingvistikaj temoj estas inkluzivataj en la temaro de la lasta kurso de mezlernejo (por la programo vd. DOGC 2008; por ekzemplo de pritrakto, vd. inter multaj aliaj Macià k.a. 2009) — fakte ŝajnas pli taŭge pritrakti tiujn aferojn en mezlernejo, unuflanke ĉar tiuj bazaj civitanaj scioj trafas pli da homoj kaj aliflanke ĉar la mallongigo de la universitataj studoj kaj de la klas-horoj lige al la Bolonja procezo aŭguras la malaperon de la devigaj universitataj kursoj pri la ĉuvaŝa.

5.2.2 La lingva merkado

Unu el la ŝlosilaj problemoj de la situacio en Ĉuvaŝio ŝajnas la manko de informoj pri alilandaj sukcesaj modeloj ĉe la aŭtoritatoj kaj ĉe la unuopuloj priokupataj pri la stato de la ĉuvaŝa lingvo. La internacie plej sukcesa lerneja modelo, disvastiĝinta en multaj landoj, estas tiu de la *lingva merkado*. Per ĝi infanoj lernas la subordigitan lingvon rekte en tiulingva medio, plej ofte ekde la frua infaneco, kaj poste uzas ĝin kiel instrulingvon. Tiamaniere la aktiva kaj pasiva spertado de la cellingvo kreskegas, en pli natura medio ol en lingvoklasoj, sen neceso multoblige la instruhorojn. Jim Cummins klare resumas la aferon en rilato al la franclingvaj lernejoj en Kebekio:

La celoj de ĉiuj mergaj programoj estas similaj, nome la evoluigo de altagrada kapablo en la franca kontraŭ neniu kosto en la kapablo de la lernantoj en la angla aŭ en aliaj stud-objektoj kiel matematiko aŭ natursciencoj. (Cummins 1989: 24)

La mergaj programoj baziĝas en la uzado de du (aŭ pli) da lingvoj kiel periloj de la instruado: la tradicia sistemo estas tiu de “frua merkado”, laŭ kiu infanoj ricevas siajn unuajn jarojn de instruado nur en lingvo fremda por ili (la subordigita), kaj iom post iom oni enkondukas la alian lingvon (la dominantan), kun kiu oni dividis la stud-objektojn en la lastaj kursoj de instruado. Tamen ekzistas ankaŭ la preskaŭ inversa eblo: la malfrua enkonduko de la subordigita lingvo kaj ĝia uzado kiel lingvo de ĉ. 80% de la instruado en la 7a kaj 8a lernojaroj kaj poste dividi egalece la uzadon de la du lingvoj. Entute mergaj programoj estas sufiĉe diversaj, sed ĉiuj montras bonajn rezultojn (Cummins 1989: 23–24).

Boix kaj Vila rakontas la interesan genezon de ĉi tiu sistemo:

Konsciaj pri tio, ke iliaj gefiloj ne povos bone lerni la francan en anglalingvaj lernejoj, en 1963 grupo de anglalingvaj gepatroj el Montrealo, la ĉefurbo de Kebekio, engaĝas sin en la aventuron krei lernejon, en kiu oni uzos la francan kiel instruperilon dum la plejparto de la lernotempo. Kvankam la sperto, baldaŭ nomata lingva merkado, ne estis esence nova per si mem, la zorga psikolingvistika kaj pedagogia evolu-observado de la projekto radikale ŝanĝis la ideon, kiun oni havis pri la instruado en dua lingvo. Ĉi tiu observado pruvis, ke la instruado en dua lingvo ne estis per si mem malutila, sed ke ĝiaj pozitivaj aŭ negativaj efektoj dependis same de la medio, en kiuj oni realigis la mergadon (media apogo de la unua lingvo de la lernantoj, prestiĝo de ĉi tiu unua lingvo ktp), kiel de la aplikataj pedagogiaj strategioj. La konstato, ke la lernantoj integritaj en la programoj en dua lingvo povis ne nur egaligi, sed eĉ plibonigi la rezultojn de la infanoj edukitaj en la gepatra lingvo igis, ke tio, kio estis aksiomoj, kiel “la lernado en dua lingvo estas pli malbona ol la lernado en la gepatra” perdis ĉian sencon, ĉar esencis kiel kaj kie oni instruas en unu lingvo aŭ alia, sed ne ekskluzive en kiu lingvo oni tion faras. (Boix kaj Vila 1998: 23)

La sistemo de lingva merkado montriĝis tiel sukcesa, ke ĝi rapide transiris la limojn de Kebekio kaj estas nuntempe sukcese adoptata por malsamaj lingvoj en diversaj landoj, kiel Hispanio, Francio kaj Britio. Krome montriĝis, ke eblas senprobleme miksi denaskulojn kaj nesciantojn de la subordigita lingvo en la sama klaso en merga programo: tio permesis ĝian uzadon en lernosistemoj de tutaj regionoj.

Tiel, ekzemple, okazas en Galegio. Analoge al Ĉuvaŝio, Galegio estas unu el aŭtonomaj komunumoj de Hispanio sub la averaĝo de porpersona enspezo, el kie granda parto de la loĝantaro elmigradis kaj kie la lingvo parte perdiĝis en la urboj, kvankam ĝi viglas en la vilaĝoj. Tie nuntempe, post 25–30 jaroj da agado, ne nur la lingvoanstataŭa procezo ŝajnas haltigita kaj la junaj hispanlingvaj generacioj akiras bonan nivelon de la galega lingvo, sed ankaŭ la rezultoj pri la kono de la hispana kaj de la angla lingvoj estas pli bonaj en Galegio ol mezume en Hispanio (Coordinadora Galega de Equipos de Normalización e Dinamización Lingüística 2009): mergaj programoj ne malhelpas la lernadon de la ŝtata lingvo, sed eĉ male.

En landoj, kiel en Francio, kie la aŭtoritatoj ne enkondukas programojn en la neŝtataj lingvoj, ekzistas asociaj iniciatoj por starigi tiujn lernejojn (simile, kiel dirite, al kebekoj siatempe). Unu el tiuj kazoj estas tiu de la lernejoj “La Bressola” [“la lulilo”] en Nord-Katalunio (t.e. en franca parta de Katalunio). Tie la kataluna lingvo suferis procezon de anstataŭado laŭlonge de la 20a jc. kaj nuntempe nur malmultaj infanoj ĝin parolas. Pro registara neagado, eĉ malhelpo, pri la loka lingvo, en 1976 grupoj de gepatroj kreis en Perpinjano katalunlingvan lernejon surbaze de la sistemo de lingva mergado kaj de tiam la nombro de lernejoj kreskas. Joan Pere Le Bihan (1996) raportas pri kelkaj ŝlosilaj elementoj en tiu sperto:

- (1) La celo ne estas, ke la lernantoj ricevu la instruadon en la kataluna lingvo, sed ke ĝi fariĝu la lingvo de komunikado inter la lernantoj (kompreneble, sen perforte trudi tion).
- (2) En la komenco plej ofte eĉ ne unu lernanto scipovas la katalunan lingvon.
- (3) Ĉar la parolkutimo kreiĝas en la momento de la komenca ensociiĝo de la infano, la instruado komenciĝas en la infanĝardeno inter la dua kaj kvara jaroj.
- (4) Lingvon oni bone lernas, kiam oni ĝin uzas kaj ĝi estas necesa por interkompreniĝi. La instruistoj senĉese instigas paroli en la kataluna, i.a. per ludado kun la lernantoj. Pro tio necesas tre malgrandaj grupoj de infanoj: ĝis dek.
- (5) Pli aĝaj, lingvospertaj infanoj helpas la novajn. Tio okazas ĉe tute novaj lernantoj, sed ankaŭ ĉe tiuj revenintaj el somera feriado en la unuaj jaroj kaj parte forgesintaj pri la lingvo pro manko de uzado. Infanoj volonte imitas la pli aĝajn.
- (6) Necesas aparte entuziasmaj instruistoj bone trejnataj en la uzata pedagogio.

La rezultoj montriĝas okulfrapaj: “Kiam oni malfermis la unuan kurson [de la lernejo en Prada de Conflent] en septembro 1989, neniu el la naŭ lernantoj parolis en la kataluna; kiam alvenis la monato februaro 1990 mi konstatis, ke por la unua fojo mi povis sidi sur la benko de la korto kaj de malproksime aŭskulti kiel la infanoj trankvile ludis en la kataluna. La kutimo estis atingita, kvankam ĝi ankoraŭ ne firmiĝis.” (Le Bihan 1996)

5.2.3 La eŭska modelo

La analizo de la eŭska modelo de instruado povas fariĝi aparte interesa por la ĉuvaŝa lingvo pro diversaj kialoj. Unuflanke Eŭskio kaj la eŭska lingvo havas demografiajn valorojn similajn al la ĉuvaŝa, eĉ pli malfavorajn: la eŭska havas duonon de la parolantoj de la ĉuvaŝa kaj ili estas multe pli minoritataj en sia teritorio. Eŭskio estas lando dividita de du ŝtatoj, Francio kaj Hispanio. En Hispanio ĝi estas siavice dividita en du aŭtonomaj komunumoj, la Eŭska Aŭtonoma Komunumo (EAK) —kun ĉ. 2,2 milionoj da loĝantoj— kaj Nafaro —kun ĉ. 0,6 milionoj. En EAK la eŭska estas denaska lingvo de 23,5% de la loĝantaro (Eusko Jaurlaritza 2009: 64). Aliflanke, malkiel ekz. Kebekio, Flandrio aŭ eĉ pli Irlando, sed simile al Katalunio, Galegio kaj Kimrio, EAK havas kompareblan socipolitikan kadron kun Ĉuvaŝio pro ilia konsiderinde limigita aŭtonomeco (tamen ĝi estas pli granda ol en Ĉuvaŝio). Kaj trie kaj laste, kiel konate, la eŭska estas konsiderata de historia lingvistiko kiel izolita lingvo: ĝia lingva distanco kun la dominanta hispana lingvo estas tre granda. Tio igas ĝin montriĝi interesa referenca kazo por la ĉuvaŝa lingvo, ĉar la sukcesaj modeloj de dulingveco en okcidenta Eŭropo kaj Kanado estas fakte inter parencaj hindeŭropaj lingvoj, kaj eblas supozi, ke iliaj leksikaj kaj gramatikaj similecoj helpas la lernadon.

Eŭskio elstaras pro sukcesa renverso de lingvoanstataŭado kaj aparte pro elstara kapablo en la eŭska lingvo per la lernosistemo, kvankam la eŭska plu estas konsiderata de Unesko kiel endanĝerigita lingvo (UNESCO 2009). Pri la plibonigo de la scipovo de la eŭska lingvo atestas Tabelo 7.

	Dulingvuloj	Pasivaj dulingvuloj	Hispanlingvaj unulingvuloj
1981 (plena loĝantaro)	21,9%	12,2%	65,9%
2006 (plena loĝantaro)	37,5%	17,3%	45,2%
2006 (10-14-jaruloj)	76,4%	14,8%	8,6%

Tabelo 7: Evoluo de la parolkapablo en la eŭska lingvo en la Eŭska Aŭtonoma Komunumo (Laŭ Eusko Jaurlaritza 2009: 36, 37)

La eŭska modelo de instruado celas la kapabligon de ĉiuj lernantoj en la du oficialaj lingvoj. Tio komenciĝas jam de la infanĝardenoj, kiuj estas amase frekventataj: en la kurso 2005–2006 89,5% de la 2-jaraj infanoj frekventis ilin (Eusko Jaurlaritza 2009: 63). En la deviga eduksistemo estas starigitaj tri eblaj vojoj (nomataj “modeloj”) en la publika instruado, laŭ la grado de spertado de la eŭska lingvo en la lerneja sistemo: unu senmerga kaj du kun diversaj gradoj de mergado.

- Modelo A uzas la hispanan kiel solan peran lingvon de instruado, krom por la instruado de aliaj lingvoj, kaj instruas la eŭskan kiel devigan stud-objekton tra la tuta elementa kaj meza instruado.
- Modelo B egalece uzas kaj la hispanan kaj la eŭskan kiel perajn lingvojn de instruado.
- Modelo D uzas la eŭskan kiel solan peran lingvon de instruado, krom por la instruado de aliaj lingvoj, kaj instruas la hispanan kiel devigan stud-objekton tra la tuta elementa kaj meza instruado.

La superregado de la hispana lingvo en la socio igas, ke la lernantoj akiras ĝin, eĉ en la modelo D, kun simila grado de regado kiel la lernantoj de unulingvaj hispaniaj regionoj, kiel atestas i.a. la sinsekvaj informoj de la Internacia Programo por la Prijuĝado de la Scioj de la Lernantoj (aŭ informoj PISA, laŭ la komencliteroj de sia anglalingva nomo), farataj de OEKE en dekoj da ŝtatoj ĉiun trian jaron, inkluzive Hispanion. Tute malsame okazas pri la regado de la eŭska.

Sekvante la kriteriojn de la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj (Konsilio de Eŭropo 2007), kaj tiel kiel agas la aliaj oficiale plurlingvaj hispaniaj aŭtonomaj komunumoj, la lernosistemo de la EAK celas, ke la lernantoj de la 6a kurso atingu la nivelon B1¹⁰ kaj fine de la 10a (lasta kurso de la deviga lernosistemo) ili atingu la nivelon B2¹¹. La postuloj ŝajnas altaj por subordigita lingvo laŭ la rezultoj. Laŭ esploro farita sur 1599 lernantoj ĵus finintaj la 6an kurson, montriĝis, ke nur la lernantoj laŭ la eŭsklingva modelo D mezume sukcesis la ekzamenon, dum preskaŭ neniu lernanto laŭ la hispanlingva modelo A atingis tion (tabelo 8).

¹⁰ Atinginte la nivelon B1, lingvouzanto “kapablas kompreni la ĉefajn punktojn de infomoj en klara laŭnorma lingvaĵo pri konataj aferoj, rilataj al oftaj situacioj en la kampo de laboro, lernejo, libertempo ktp. Kapablas elturniĝi en la plimulto de situacioj, kiuj povas okazi dum vojaĝo en teritorio, kie la lingvo estas parolata. Kapablas produkti simplan kaj koheran tekston pri temoj, kiuj estas konataj al li/ŝi aŭ rilataj al la propra intereskampo. Kapablas priskribi travivaĵojn kaj okazintaĵojn, revojn, esperojn kaj ambiciojn, kaj doni koncizajn argumentojn kaj klarigojn pri opinioj kaj planoj.” (Konsilio de Eŭropo 2007: 32)

¹¹ Atinginte la nivelon B2, lingvouzanto “kapablas kompreni la ĉefajn ideojn de kompleksaj aŭ abstraktaj tekstoj, inkluzive diskutojn rilate lian/ŝian fakterenon. Kapablas flue kaj spontanee interagi kun denaskulo, kaŭzante fortostreĉon ĉe neniu el la parolantoj. Kapablas verki klaran kaj detalan tekston pri larĝa gamo da temoj, kaj esprimi sian opinion pri aktuala temo, listigante la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de diversaj ebloj.” (Konsilio de Eŭropo 2007: 32)

	Sukcesis la ekzamenon
Modelo A	2,0%
Modelo B	39,3%
Modelo D	66,9%

Tabelo 8: Procento de sukcesoj en la ekzameno pri la nivelo B1 de la eŭska fine de la sesa lernojaro en la Eŭska Aŭtonoma Komunumo laŭ lernomodeloj (ISEI-IVEI 2007: 26)

Esploro post la 10a jaro por la modeloj B kaj D laŭ la nivelo B2 donas similajn rezultojn: 32,6% da sukcesoj por B kaj 68% por D (ISEI-IVEI 2005: 36).

Certe influas en tiuj rezultoj la malsama distribuo de denaskaj eŭsklingvanoj tra la modeloj: ĝi ekz. estas preskaŭ nula por la modelo A (inter ĝiaj frekventantoj, malpli ol 1% estas denaskaj eŭsklingvanoj). Lernantoj ne uzantaj la eŭskan kiel familian lingvon atingas 26–27% da sukcesoj laŭ la modelo B en la du niveloj kaj 47–48% laŭ la modelo D (ISEI-IVEI 2005: 48, ISEI-IVEI 2007: 52).

Atentindas ankaŭ konsiderinda diferenco inter la kvar analizitaj kapabloj: voĉa komprenkapablo, lega komprenkapablo, parolkapablo, skribkapablo. Voĉaj kapabloj havas pli altajn rezultojn ol legoskribaj, komprenaj kapabloj ol aktivaj. Eĉ tiel, la lernantoj laŭ modelo A atingas nur 42,5 poentojn el 100 en la voĉa komprenkapablo (ISEI-IVEI 2007: 103).

La rezultoj montras la ŝlosilan gravecon de aktiva uzado de la lingvo en la lerneja sistemo, kiam ĉi tiu ne estas dominanta en la koncerna socio, kaj des pli kiam ĝi estas lingvistike tre fora. La instruado nur en la dominanta lingvo, kun instruado de la subordigita lingvo kiel stud-objekto, montriĝas klare malsufiĉa, por ke la gejunuloj trapasintaj sian lernejan edukadon kapable regu la lokan lingvon. Ne pro nenio en Sud-Katalunio —konsiderata unu el la plej sukcesaj modeloj de restarigo de subordigita lingvo, sed kiun oni ne detale tuŝos ĉi tie pro manko de spaco kaj troa distanco kun la ĉuvaŝa kazo— elektas la ekskluzivan uzadon de la subordigita kataluna kiel pera lingvo de instruado en la elementa lernejo (ses unuaj jaroj) kaj nur poste ekuzas tiucele ankaŭ la dominantan hispanan. En Eŭskio tiun elekton individue faras la gepatroj mem: la modelo A estas elektata de malpli kaj malpli da homoj kaj en la kurso 2009–2010 ĝi kunigos malpli ol 5% de la novaj lernejoj de la unua kurso de elementa edukado, dum la modelo D estas larĝe la plej populara kaj samkurse ĝin sekvas pli ol 71% da lernejoj (Peláez 2009).

5.2.4 La eksterlerneja diskonigo de la lingvo

La lingvon oni povas lerni ekster la lerneja kadro, ekzemple en kursoj por plenkreskuloj. Tiuj kursoj fakte estas nemalhaveblaj, se oni efektive deziras la reensociigon de lingvo, ĉar ekz. homoj priservantaj publikon verŝajne devus koni ambaŭ lingvojn. Tamen ne ekzistas en Ĉuvaŝio regulaj kursoj por plenkreskuloj pri la ĉuvaŝa, ĉu organizitaj de registaraj aŭ ne-registaraj organizoj¹².

Por komparo, en Latvio komence de la 1990aj jaroj “en preskaŭ ĉiuj laborlokoj klasoj pri la latva lingvo estis senpage organizataj dum laborhoroj” (Druviete 2001: 1). Sekve de tiaj politikoj la neetnaj latvoj, kiuj ne havis sciojn pri la latva, pasis de 78-80% en 1989 al 9% en 2000 (Druviete 2001: 2).

Siaflanke, Katalunio havas specifan institucion por “instigi la konon kaj la uzon de la kataluna lingvo”: la Asociiĝo por la Lingva Normaligo (*Consorti per a la Normalització Lingüística*). En 2007 ĝi havis buĝeton de 31,8 milionoj da eŭroj kaj 512 laboristoj, el kiuj ĉ. 450 lingvaj kaj aliaj fakuloj (CPNL 2008: 9-10)¹³. Dum la kurso 2006-2007 ĝi organizis kursojn por pli ol 91 000

¹² Mi ricevis informojn nur pri unuopulaj iniciatoj en la lernojaro 2008-2009.

¹³ Oni tamen ne konsideru tiun ĉi organizon kaj buĝeton la solaj katalunaj registaraj organizaĵoj celantaj la disvastigon de la kataluna lingvo. Indas enkalkuli minimume ankaŭ la Vicministerion pri Lingva

plenkreskuloj, organizis ekspoziciojn kaj tre diversajn aranĝojn, solvis lingvajn dubojn de laboristoj en la administracio kaj de unuopuloj, publikigis diversajn eldonaĵojn ktp. ktp. Aparte interese estas, ke ĝi ĉerpas fortojn ankaŭ de volontula laboro, ekz. per la t.n. “lingvaj paroj”, laŭ kiuj katalunlingvano regule renkontiĝas kun lernanto de la kataluna, por ke tiu ĉi praktiku la lingvon per babilado en malstreĉa, amika etoso¹⁴. En 2007 pli ol 6000 tiaj paroj renkontiĝadis (CPNL 2008: 28).

La Asociiĝo aparte zorgas pri organizado de aranĝoj por infanoj kaj gejunuloj. Bedaŭrinde, denove, la proponoj de kursoj kaj aktivaj specife por infanoj kaj gejunuloj en la ĉuvaŝa en la urboj estas praktike neekzistantaj. Ankaŭ la proponoj de libroj en la ĉuvaŝa estas nula en la plimulto de urbaj librejoj kaj aparte ne videblas libroj por infanoj (des pli modernaj kaj koloraj, kiuj povus laŭaspekte konkurenci kun la ruslingvaj).

Ankaŭ la gazetaro kaj aŭdvidaj amaskomunikiloj en la ĉuvaŝa malfortas. Aparte grava paŝo antaŭen estas la apero de Nacia Radio de Ĉuvaŝio, kiu komencis dissendi ĉi-jare (aprilo 2009) kaj kiu laŭplane ekde Novjaro plene funkcios. Per ĝi la nombro de horoj da ĉuvaŝa en la radio plurobliĝis. La programo (po 16 horoj tage en oktobro 2009) egalece alternas blokojn en la ĉuvaŝa kaj en la rusa, plej ofte unu-horajn. Tamen, denove surprize, la ruslingvaj elsendoj enhavas programerojn por infanoj, dum ili forestas por la ĉuvaŝa. Entute la ĉuvaŝlingva programo precipe konsistas el folkloro muziko, radioteatro, intervjuoj, elsendoj pri regionoj kaj vesperaj novaĵoj: ĝi klare ne celas infanojn kaj gejunulojn (Nacional’noje Radio Ĉuvaŝii 2009).

Plie, denove temas pri iniciato plene egalisma, en kiu miksiĝas la dominanta kaj subordigita lingvo. Por komparo la radiaj kaj televidaj programoj dependantaj de la kataluna registaro dissendas ekskluzive en la kataluna lingvo. En EAK la unua televida programo lanĉita estis en la eŭska kaj, kvankam baldaŭ poste ekfunkciis hispanlingva programo, la eŭsklingva ĉiam ricevas apartan apogon, ekz. per la ekskluziva elsendo de futbalmatĉoj, unu el la plej popularaj televidaj programeroj kaj kiujn do dum jaroj oni povis spekti nur en la eŭska (nuntempe aliaj, ŝtataj, programoj regule dissendas futbalmatĉojn en la hispana).

5.3 La disvastigo de la uzado

Lingvon oni ne povas reensociigi nur surbaze de instruaj politikoj. Homoj perdas la kapablon uzi lernitan lingvon, se ili ne efektive uzas kaj trejnas ĝin. Krome lingvo sen perspektivoj de uzado estas malvolonte lernata. Tre viva anekdoto montranta la senefikon de tiaj nur-instruaj politikoj estas la jena rakonto el la irlanda vivo meze de la 1930aj jaroj:

Kiam mi estis ok-jara, mi iris al vendejo por aĉeti dolĉaĵojn kun mia fratino, tri jarojn pli aĝa ol mi. La virino malantaŭ la vendotablo, je mia granda surprizo, demandis al ni, kial ni ne parolas irlande. Ni nur mallevis la kapon, kiel faras infanoj. Sed ekstere mi demandis la fratinton, kion celis diri la virino. Ŝi klarigis, ke, ĉar ni lernas la irlandan en la lernejo, ni devus ĝin ĉiam paroli. Kaj mi tute honeste demandis: “La irlanda, ĉu ĝi estas por paroli?” Ĉi tiu epizodo montras por mi la neevitablan efekton, kiam grava parto de la socio rifuzas la respondecon en socia entrepreno kaj transdonas ĝin al la lernejoj. (Macnamara 1971: 73, citita en Junyent 1992: 86).

Simile, en intervjuoj al ruslingvaj urbanoj, universitataj diplomitoj inter 25 kaj 35 jaroj, al la demando, ĉu iam al ili mankis la scio de la ĉuvaŝa la ĝenerala respondo estas, ke malofte aŭ eĉ neniam. En kelkaj okazoj homoj raportas, ke ili sentis sin malkomfortaj en iuj labormedioj, kie la ĉuvaŝa estis ofte uzata inter kolegoj aŭ kiam ili ial devis rilati kun vilaĝanoj, sed tio montriĝas ne sufiĉa por senti efektivan bezonon. Ili ŝajne preferas eklabori en alia entrepreno. Al demando, ĉu entute ili taksas la ĉuvaŝan utila, la respondoj diversiĝas de “ege utila” al “plene

Politiko (*Secretaria de Política Lingüística*), kiu krom gvidi la procezon prizorgas i.a. ankaŭ la scian esploron de ĝia evoluo; la centron de terminologio Termcat; kaj la Instituton Ramon Llull, por la ekstera diskonigo de la katalunaj lingvo kaj kulturo.

¹⁴ La valoro de ĉi tiu iniciato por la socia unueco estas nekalkulebla.

senutila”]; foje la utileco rilatas al cinika respondo: laŭ iuj ĝi utilas praktike nur por politike karierumi. Plej ofte tamen oni sentas malgrandan utilon lerni la lingvon. Laste, al demando, ĉu la homoj ŝatus esti lernintaj pli bone aŭ entute esti lernintaj la ĉuvaŝan, multaj respondoj estas neaj, kaj jesaj respondoj estas nur milde pozitivaj. Se tiuj tendencoj montriĝas efektivaj inter la junaj ruslingvaj urbanoj, kiel mi suspektas, ili konstatigas ne nur ke disvastigo de la socia uzado de la lingvo estas malmulta, sed ankaŭ ke junaj aŭ baldaŭaj gepatroj taksas negrava la lernadon de la ĉuvaŝa en la lernejoj. Estas interese rimarki, laŭ la ricevitaĵoj, ke la homoj ne kontraŭas la instruadon de la lingvo, eĉ ofte favoras, ke ĝi estu kiel nun deviga stud-objekto (malgraŭ la ĝenerale taksata malbona propra sperto), sed samtempe konfirmas, ke ili ne instigos aŭ eĉ ne zorgos pri la efektiva lernado de la lingvo fare de siaj infanoj, kaj nenion celas mem fari, por certigi ĝin. Montriĝas iagrada lojaleco al la ĉuvaŝa —lingvo, kiun homoj plej ofte ege bedaŭros, se ĝi malaperos, kvankam ili ne kredas, ke tio okazos—, sed ili mem pretas apenaŭ nenion fari por mem lerni la lingvon aŭ ke iliaj gefiloj tion faru. Se la registaro tion iel sukcesas per la lernejo, estos bone; se ne, tio estos bedaŭrinda, sed ili ne sentos sin respondecaj pri la rezulto.

Por ŝanĝi tiajn sintenojn —kiuj fakte ne estas kontraŭaj al la lingvo, sed nur apenaŭ favoraj al ĝi—, evidentiĝas, ke necesas puŝi la socian uzadon de la lingvo en la Respubliko.

La unua paŝo estas la disponigo de la ĉuvaŝa lingvo, ne nur por plenumi fundamentan rajton de la individuoj (agnoskitan de la Eŭropa Ĉarto pri la Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj, subskribita, sed ne ratifita, de Rusio¹⁵) kaj la postulojn de la federacia kaj respublika leĝaro, sed ankaŭ por videbliki la uzadon de la lingvo kaj montri ties efektivan subtenadon per la agado de la administracio. Bedaŭrinde, kiel montriĝis pri la lerneja sistemo, tio ne estas efektivigata. Krom en kelkaj dokumentoj, kie la rusa kaj ĉuvaŝa estas egalece uzataj, parola priservado en la ĉuvaŝa en la administracio ŝajnas malfacila en la urboj. Krome, blanketoj en la ĉuvaŝa kvazaŭ nenie ekzistas. Kiel ekzemplo, la oficiala portalo de la Ĉuvaŝa Respubliko www.cap.ru ne estas en la ĉuvaŝa, sed ĝi legeblas, krom en la rusa, parte ankaŭ en la angla kaj la germana. Eĉ la retejo de institucio celanta la konservadon kaj instigon de la ĉuvaŝa kulturo kiel la Nacia Biblioteko de la Ĉuvaŝa Respubliko, www.lib.cap.ru, estas nur en la rusa lingvo. Same okazas pri la Ĉuvaŝa Ŝtata Universitato, www.chuvsu.ru, kaj eĉ pri la nove fondita dulingva Nacia Radio de Ĉuvaŝio, gov.cap.ru/hierarhy.asp?page=1299/2899/574642/589704 (konsultoj faritaj en aŭgusto 2009).

La disponigo de la ĉuvaŝa lingvo fare de la administracio signifas ĝian postulon por labori en ĝi, aŭ almenaŭ en ĉiuj postenoj, en kiuj oni traktas kun la publiko (kio inkluzivas ekz. tutajn multnombrajn kolektivojn kiel instruistojn, policanojn k.a.). Fakte la unua redakto de la respublika lingvoleĝo de la 27a de oktobro 1990 —unu el la unuaj de rusia respubliko—, fiksas dek-jaran periodon por tion efektivigi (Ĉuvaŝkaja Respublika 1993: 15–20) kaj estis ellaborita programo por tio (Ĉuvaŝkaja Respublika 1993: 59–73). La celita periodo estis plej verŝajne tute ne efektivebla, eĉ uzante ĉiujn perfortajn eblojn je la dispono de registaro de sendependa lando, kio ne estis la kazo de Ĉuvaŝio, des malpli en situacio de forlaso de la gepatra lingvo fare de la ĉuvaŝa loĝantaro¹⁶. Tio ekzemple evidencas okulfrapajn diferencojn kun la baltaj respublikoj, kiuj iniciatis la starigon de lingvaj leĝoj en Sovetio en la komenco de 1989 (Maurais 1991: 75). La manko de socia forto kaj buĝeta kapablo abortigis la ĉuvaŝian leĝon¹⁷,

¹⁵ Tiu manko de ratifo ne malhelpas ekz. ke la rusia Ministerio pri Regiona Planado iniciatis en junio 2009 komunan programon ĝis 2011 kun la Konsilio de Eŭropo kaj la Eŭropa Komisiono pri minoritataj kaj minoritataj lingvoj, kio montras rimarkinde pli grandan engaĝiĝon de la federacia rusia registaro pri la afero ol de aliaj landoj de Eŭropo, eĉ de Eŭropa Unio.

¹⁶ Pri problemoj en eksa Sovetio kaŭzitaĵoj de troa hasto en la klopodo reversi la ekzistantan lingvan (kaj socian) hierarkion vd. ekz. Mikhalchenko (2000).

¹⁷ Ĝuste tion substrekas Michael Kirkwood en sia raporto pri la rusiaj lingvopolitikoj en la 1990aj jaroj: “Lingvopolitiko implicanta la plimultigon de eldonado, la trejnado de instruistoj, la produktado de instruiloj, la starigo de administracia aparato en ekonomia kunteksto de rapide ŝrumpantaj rimedoj ne povas sukcesi, kaj fakte estas oftaj raportoj en la gazetaro atentigantaj pri la manko de lingvotrejnado, eldonado de lernolibroj, uzado de la lingvo en la amaskomunikiloj ktp.” (Kirkwood 1997: 79).

eĉ antaŭ tio, ke la centraj organoj de la Rusa Federacio denove sukcesis starigi la federaciajn leĝojn super la respublikajn.

Ĉiuokaze la enkonduko de plia lingvo en la administracion ne estas facila afero. Unuflanke ĝi postulas la starigon de lingvaj postuloj al aspirantoj por iuj novaj postenoj kaj aliflanke la recikladon de la ĝisnunaj laboristoj. Por eviti nedezirindajn kontraŭstarojn kaj igi la procezon socie kaj buĝete akcepteblan, la postuloj en ambaŭ kolektivoj devas esti laŭgradaj kaj laŭeble interkonsentataj kun la sindikatoj. Ekzemple postuli ĉe la nunaj funkciuloj nivelon A1 laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj post kvin jaroj, A2 post dek ktp.

Tiamaniere, krom la efektiviĝo de rajto de la civitanoj, la administracio agas kiel labordonanto por homoj scipovantaj la subordigitan lingvon, kaj tiamaniere intervenas, por ke ĝi estu socie konsiderata utila.

Laŭ ritmo neniam pli rapida ol tiu de la administracio, eblas postuli la disponigon de la ĉuvaŝa lingvo al la privataj entreprenoj. Unua paŝo povas esti la deviga uzado de la ĉuvaŝa en la afiŝoj de magazenoj, menuoj de restoracioj ktp. Denove, krom la plenumo de civitana rajto, la vastigo de la publika videbleco de la ĉuvaŝa ankaŭ multobligas la pasivan spertadon de la lingvo fare de la homoj, normaligas ĝian uzadon kaj faciligas la lernadon.

Tiucele la aperigo de registaraj radiaj kaj ĉefe televidaj elsendoj en la ĉuvaŝa lingvo —laŭaj al la kriterioj de kvalito, enhava intereso, taŭgeco ktp— estas ŝlosilaj nuntempe por la reensociigo de la lingvo.

Sed ne eblas nur postuli la disponigon al la privataj entreprenoj: necesas samtempe krei la necesajn rimedojn por helpi ilin tion fari: lingvajn kursojn por plenkreskuloj, departementon por solvi lingvajn dubojn ktp.

5.4 Resumo de la ŝtataj agadoj

Agnoskinte la grandan diferencon de kazoj, Peter Hans Nelde proponas kvar kriteriojn por la lingvopolitikoj en Eŭropa Unio:

- (1) *la koncepton de renversita aŭ pozitiva diskriminacio, tio estas apogado por superi la pli altajn kostojn kaj klopodojn necesajn por produkti kaj enmerkatiigi materialojn kaj/aŭ personara trejnado en la lingvo, kun la celo, ke minoritataj parolantoj havu la samajn lingvaj rajtojn kiel la anoj de la majoritata lingvogrupo;*
- (2) *la koncepton de malcentralizo, tio estas apogo al transiro al loka decidfarado kaj al rilatoj de la civitanoj kun la aŭtoritatoj ene de la teritorio, malfermante la eblon uzi la lingvon kaj al la starigo de lingvopolitiko;*
- (3) *la tre proksiman koncepton de disponigo, tio estas la apogo al tio, ke la civitanoj povu uzi sian lingvon en kiel eble plej multaj sferoj (sendepende de tio, ĉu ekzistas aŭ ne leĝo difinanta lingvaj rajtojn), tiel ke la civitanoj povos trovi solvojn al siaj problemoj kaj efektiviĝi ilin, anstataŭ dependi de la aŭtoritatoj;*
- (4) *entute la celon stimuli multlingvismon, kie la lernado de lingvo ne estas instigata je la kosto de diskriminaciado kontraŭ aliaj. Tiuj projektoj precipe celos soci-ekonomiajn aferojn, publikan administracion kaj ajnan kampon, kie la uzado de la lingvo plifortigos ĝian prestiĝon. (Nelde 1997: 289)*

Ni povas resume diri, ke:

- (1) pozitiva diskriminacio por favori la ĉuvaŝan ne estas farata; male, la respublika leĝaro kaj la registara agado starigas nur formalan ŝajnigon de egaleco en iuj publikaj afiŝoj kaj dokumentoj; agado por la ĉuvaŝa lingvo, kiel la aperigo de nacia radio en ĝi, aŭtomate estas kompensata per elsendo de duono de la programoj en la rusa¹⁸;

¹⁸ Indas atenti la pritakson de Nelde pri pozitiva diskriminacio: “Pozitivan diskriminadon oni povas vidi kiel pozitivan, ĉar ĝi donas tujajn rezultojn kaj kompensojn por geografiaj, historiaj kaj politikaj malavantaĝoj. La sola negativa aspekto de pozitiva diskriminacio estas ĝia prezo: pozitiva diskriminacio

- (2) la Rusia Federacio, malgraŭ sia nomo, estas ŝtato konsiderinde pli centrizita ol aliaj eŭropaj ŝtatoj; tamen montriĝas, ke la Ĉuvaŝa Respubliko uzas multe malpli la ekzistantajn eblojn, kiuj permesas, ke ekz. en Tatarstano oni instruas la tataran po kvin horoj semajne en ruslingvaj lernejoj aŭ ke en la Tuva Respubliko la tuva estas la lingvo de instruado de 80% de la elementaj kaj mezaj lernejoj (Borgoiakova 2002: 2)¹⁹;
- (3) la disponigo de la ĉuvaŝa en la eduka sistemo aŭ en publika administracio estas ege manka, ofte tute ne ekzistanta;
- (4) multlingvismo, kvankam proklamata celo, estas klopodata praktike nur per tre neefektiva lerneja sistemo.

5.5 La desuba premado

Procezoj de restarigo de lingvo postulas kombinon de desupraj kaj desubaj fortoj: registaraj klopodoj devas trovi socian akceptemon, por ke ili efikiĝu; socia agado instigas la agadon de la registaro kaj plifortigas ĝin. Se registaro rifuzas favore agi aŭ apenaŭ tion faras, neregistara organizado estas la sola vojo por kunigi fortojn, organizi agadojn, ŝanĝi sintenojn, eldoni gazetojn kaj librojn, starigi radiojn kaj televidojn, fondi infanĝardenojn kaj lernejojn...

Kiel vidite, la neregistara porĉuvaŝa agado estas malforta kaj en ĝi nek la lingvo nek la urbaj ĉuvaŝoj ŝajnas okupi grandan atenton, sed precipe la konservado kaj valorigo de tradicioj, la prestiĝigo kaj fierigo de la ĉuvaŝeco, kaj la proksimigo de la diasporaj kaj respublikaj ĉuvaŝoj.

Problemo en tiaj ĉi prioritatoj estas la manko de substreko pri la reinterpretado de la tradicioj kaj ĝenerale pri kultura renovigo. La substreko de iu pura, mitiĝinta pasinteco malbone akordas kun urba miksa socio. Ne hazarde ruslingvaj urbanoj ligas al la ĉuvaŝa lingvo ideojn kiel “nacia kostumo”, “pagana”, “avina”. Michel Francard tre precize atentigas pri difinitaj ideoj kuŝantaj sub la esprimoj kaj agadoj de iuj defendantoj de subordigitaj lingvoj, liakaze en rilato al la valona kontraste al la franca:

Kontraŭuloj de la tiel nomata rfondu walon [kodigita valona lingvo] adoptas la logikon de diglosio, kiun karakterizas ambigua diskurso ekzaltanta la kvalitojn asociatajn kun la dominanta lingvo (beleco, harmonio, intimeco, varmo, proksimeco al homoj kaj al la ĉiutaga vivo ktp) —kvalitojn, kiujn oni ne atribuas al la dominanta lingvo—, dum samtempe ĝi refortigas la funkciajn superregadon de la dua (la franca) super la unua (la valona). (Francard 2009: 112)

La alternativo estas la ampleksigo kaj diversigo de la sferoj, en kiujn la subordigita lingvo estis puŝata.

Sed tiu ampleksigo estos pli glata, se la lingvo transiras la kadrojn de la strikta etne ĉuvaŝa loĝantaro por fariĝi tutsocia. Etnaj rusoj ligas al la ĉuvaŝa lingvo ankaŭ ideojn kiel “tjurka” kaj “orienta”, sekve “fremda”, dum similaj konceptoj ne ekzistas inter ĉuvaŝlingvanoj en rilato al la dominanta lingvo, ĉar ĝi iamaniere estas sentata kiel universala en la socio. Tiurilate, la logiko de striktaj kaj ekskludaj etnaj difinoj amase disvastigata dum la sovetia tempo, sed daŭrigata de folklor-bazita naciismo, forte rolas kontraŭ naciaj malplimulto kaj lingvoj en miksaj kuntekstoj kiel la urbaj: tie supervenkas la dominanta etno kaj lingvo, kiujn oni sentas pli inkluzivecaj, malpli ligitaj al iuj specifaj kulturaj praktikoj pli-malpli fosiliĝintaj. Kontraste, la larĝa plimulto de loĝantoj de Katalunio (aŭ Eŭskio) sentas sin kaj katalunoj (aŭ eŭskoj) kaj hispanoj —kun eventuala pli forta tendenco al unu el la du flankoj de la kontinuaĵo. La inkluziveco de la koncepto “kataluno” aŭ “eŭsko”, ne forbaranta la eblon esti ankaŭ “hispano” (aŭ/kaj “arabo”, “rumano” aŭ “ruso” ĉe enmigrintoj) malfermas la eblon, por ke la loĝantaro, sendepende de sia

estas multekosta” (Nelde 1997: 290).

¹⁹ Tiurilate surprizas, ke la unua peto de antaŭnelonga ĉuvaŝisma manifesto estas la federaci-skala kunoficialigo de la ĉuvaŝa (Respublikanskij Graždanskij Kongress 2005). Tiu paŝo —ja farita en efektive egalismaj plurlingvaj landoj kiel Kanado, Belgio, Svislando k.a.— ne ŝajnas vere prioritata, kiam la oficialigo de la ĉuvaŝa estas apenaŭ reala en la Ĉuvaŝa Respubliko.

deveno kaj de sia hejma lingvo, lernu kaj socie uzu ankaŭ la lokajn lingvojn. Aliflanke, tio permesas grandparte “senemociigi lingvajn konfliktojn”, laŭ la esprimo de Nelde (1997: 290). Tiu senemociigo permesas pli pragmatajn kaj profesiajn alirojn al la lingvaj demandoj, laŭeble apartigante ilin de la politika disputado.

Krome, la substreko pri la konstanta renovigo de la nacia kulturo, superanta la emon al fidela reproduktado de klasikiĝintaj folkloraj ŝablonoj, certigas la efektivan vivantecon de la kulturo. Tiucele, ekzemple, organizoj kiel la Ĉuvaŝa Nacia Teatro devus pli atenti la aldonon de sia repertuaro de alilandaj verkistoj, ĉefe nuntempaj, kompreneble en la ĉuvaŝa lingvo. Tia kulturprogramo ŝajnas multe pli akorda al universitata urbo, kiel Ŝupaŝkaro, kaj alloga por ties ĉi inteligencio, kiu finfine estas la modelo grandparte sekvota de la cetera loĝantaro. Kontraŭe, se Ŝupaŝkaro ne aspiras al pli ol daŭre esti provinca urbeto, bela kaj pura, tiam plej verŝajne la rusa lingvo estas senrivala.

6 La ellaborado

La ellaboriteco de la ĉuvaŝa lingvo estas malfacile taksebla: unuflanke, kiel vidite, ĝia socia formala uzado estas malmulta, sed aliflanke ĝi de jardekoj havas pli-malpli protokolajn uzojn en la administracio. Tio ekz. igas, ke jura terminaro estas disvolvata tigrade, ke leĝoj estas eldonataj en la ĉuvaŝa²⁰. Aliflanke ĝia foresto en la sciencaj fakoj de la universitatoj ne instigas la evoluigon de scienca kaj teknika terminaroj. Entute, la manko de perspektivo kaj de registara aŭ neregistara impeto, por ke la lingvo akiru novajn uzosferojn, postrestigas la ellaboradon.

7 La akceptado kaj revizio

Klaras, ke ĉia interveno en socio por ŝanĝi ĝin estas malfacila kaj delikata operacio. Se tio rilatas al afero tiel kerna kaj simbola kiel lingvo, oni devas esti aparte singardaj. Alilandaj spertoj estas ege utilaj kaj lernendaj, sed ĉiuj socioj estas ne nur unikaj, sed eĉ tre specifaj kaj rapide evoluantaj. Entute, la komplikeco de la afero evidentiĝas, kiam ni trarigardas la lastajn du jardekojn da lingvopolitiko en Ĉuvaŝio.

Sed ĝuste unu el la plej surprizaj aferoj en la ĉuvaŝa kazo estas la malmulteco de esploroj pri la socia stato de la lingvo, kaj aparte la manko de registaraj esploroj. Certe la cirkonstancoj de manko de buĝeto malebligas krei fakan strukturon por plani, gvidi kaj sekvi la evoluon de la lingvo en la socio. Tamen lingvopolitikoj postulas monon kaj antaŭvideblas, ke registaro ne nur listigu kiel ĝi elspezas ĝin (kiel ĝi zorge faras ekz. en Ĉuvaŝskaja Respublika 2008b), sed ankaŭ zorgu, ke ĝi estu efike, celtrafe uzata²¹. Kiam registaro ne instigas tiajn esplorojn oni rajtas timi, ke al ĝi mankas efektivaj celoj, kontraŭ kiuj kontrasti la faktojn. Sed, denove, surprizas ankaŭ la manko de iniciatoj en la porĉuvaŝaj neregistaraj organizoj kaj la ĉuvaŝia akademika mondo por dokumente priskribi la faktojn en la faka socilingvistika gazetaro. Preter eventuala denuncado —al kio la akademika mondo estas pli-malpli indiferenta kaj senpova—, ni bezonas multajn, konkretajn kaj aktualajn elementojn por pli bone kompreni la faktojn kaj esti kapablaj fidine interveni.

²⁰ Efektive, unu el la malmultaj ĉuvaŝaj fakvortaroj estas la 2400-termina *Rusa-ĉuvaŝa-angla vortaro pri juraj terminoj* (Viktorov, Isaev k.a. 1996).

²¹ La ĉuvaŝa registaro havas tri indikilojn por spuri la “efektivecon” de la plenumo de la Programo pri la lingvoleĝo: (1) la kalkulon de la sciencaj artikoloj pri la ĉuvaŝa lingvo; (2) la renovigon de lernolibroj en la ĉuvaŝaj lernejoj; (3) la atingon de difinita kvanto da studentoj pri ĉuvaŝa lingvo kaj kulturo en la universitato (Ĉuvaŝskaja Respublika 2008c, 2008d). Eĉ ne unu de tiuj kriterioj rigardas la efektivan uzon de la ĉuvaŝa en la socio, sed ili ekskluzive okupiĝas pri ties akademika intereso, kiu finfine estas tute sendependa de tio, ĉu temas pri vivanta aŭ formortinta lingvo. Entute ni povus konkludi, ke oni kvazaŭ taksas la lingvoleĝon kiel sole celantan la vekon de intereso pri la ĉuvaŝa inter lingvofakuloj anstataŭ en la socio, en kiu ĝi devus disvolviĝi.

Skize, Albert Bastardas (1991: 55–58) proponas, sekvante Jean-Louis Corbeil, distingi la analizon de la “instituciigitaj rilatoj” kaj de la “individuigitaj rilatoj”. Klaras, ke la agadoj de la individuoj estas tre influataj de tiuj de la institucioj, kvankam tiu influo estas malrapida.

En la unua sfero indas esplori la lingvajn agadojn de la sociaj organizaĵoj, tio estas: “la lerneja sistemo, la universitata sistemo, la televidaj dissendoj, la reklamoj, la publika afiŝado, la internaj kaj eksteraj skribaĵoj de la entreprenoj ktp.” Kiel, kigrade, en kiaj okazoj kaj kun kiu oni uzas la subordigitan lingvon. Sed, krom tio, indas ankaŭ analizi la konsiston, agadojn kaj sintenojn de la homoj interne de la organizaĵoj, ĉar ili estas esencaj por la ŝanĝoj, kiujn ni deziras enkonduki en la sistemon. Gravas por ĉiu tipo de organizo kompreni ekz. la gradon de kono de la subordigita lingvo fare de ties membroj, ilia aĝo, la distribuo de la lingvogrupoj en la diversaj niveloj de la organizoj kaj en ilia geografia distribuo ktp. La disaj kaj nemultaj artikoloj pri sociaj aspektoj de la ĉuvaŝa efektive tuŝas kelkajn tiajn aspektojn, sed nur en konkretaj partaj analizoj (bedaŭrinde ofte surbaze de enketoj starigitaj en neklaraj kondiĉoj, el kiuj oni eltiras multnombrajn numerojn). Plej elstaras pro sia larĝa perspektivo la kvalita superrigardo de Xuzangaj (1999).

Pri la individuoj mem, necesas kompreni la gradon de iliaj diversaj lingvokapabloj (pasivaj aŭ aktivaj, parolaj aŭ skribaj). Necesas kompreni ankaŭ tiun iom malfacile difineblan koncepton de “sinteno”: kiajn sintenojn havas la homoj en rilato al la subordigita lingvo? Kaj necesas ankaŭ scii pri la uzoj de la lingvo: kiu uzas ĝin kun kiu, kiam, kie, kiel?

Kaj tiajn informojn ni bezonas havi periode. Kiel ni povas pritaksi la sukceson de lingvopolitiko surbaze de informoj de antaŭ dek aŭ dudek jaroj, kiel okazas nun? Cetere, bonas scii, kia estas la situacio de la lingvo en difinita momento, sed eĉ pli gravas kompreni kiel ĝi evoluas. Tio permesos nin pli ĝuste kompreni la kialojn de la evoluo, kaj sekve (re)difini nian agadon sur la lingvo.

Ĉio ĉi estas ne malhavebla por efektiva lingvopolitiko: necesas vera Observejo de la Ĉuvaŝa Lingvo.

8 Konkludoj

La zorgo pri la hereda havaĵo montras la gradon de memestimo de komunumo: la detruo de la historiaj urbocentroj por igi ilin samkiel iun ajn anoniman urbon el la tuta Okcidento, aŭ la neniigo de malnovaj lignaj domoj, anstataŭ ilia renovigo, por starigi 15-20-etaĝajn loĝblokojn laŭ la modelo de Moskvo (kaj la malmodelo de la hodiaŭa okcidenta Eŭropo) spegulas la mankon de estimo de la homoj pri ilia historio kaj identeco kaj, male, iaspeca konkuro al kiel eble plej rapida soziiĝo kun aliaj malsamaj, malimitindaj realaĵoj. La disfalo de la ĉuvaŝa lingvo estas plia ero en socia patologio kaj la procezoj por ĝia restarigo devas enkadriĝi en ampleksaj agadoj larĝe trans la solaj lingvaj aferoj. Tamen, tutcerte, restarigo de lingvo —aŭ ties ĉi *normaligado*, laŭ la trafa esprimo de la ĉuvaŝia lingvoleĝo— postulas specifajn agadojn en praktike ĉiuj sferoj de la socia vivo.

Tamen, se okupiĝi nur pri strikta lingvopolitiko, staras malkuraĝa registara agado por atingi ne la normaligon de la ĉuvaŝa en la Ĉuvaŝa Respubliko, sed eĉ la haltigon de la lingvoanstataŭado. Tiucele verŝajne taŭgus revizio de la nuna ĉuvaŝa kodlingvo por elpurigi ĝin de politike entruditaj ruslingvismoj, kio proksimigus ĝin al la Jakovleva modelo. Sed —plej grave— se oni analizas la agadojn por la socia disvastigo de la lingvo, evidentiĝas, ke la registaraj agadoj baziĝas preskaŭ sole en la deviga lerneja instruado de la ĉuvaŝa, kiu montriĝas manka, neefika kaj fora de la alilandaj sukcesaj pedagogiaj metodoj. Tiuj metodoj baziĝas sur la uzado de la subordigita lingvo kiel pera lingvo en infanĝardenoj, lernejoj kaj universitatoj, aparte kiam ekzistas granda lingva distanco inter la dominanta kaj subordigita lingvo. Sed krome preskaŭ forestas en Ĉuvaŝio la paralelaj politikoj por efektiva reensociigo de la lingvo, kies disponigo fare de la publika kaj privata sektoroj restas tre lama, malgraŭ la proklamo de ties oficialeco. Praktike ne ekzistas observado de la evoluo de la socia stato de la lingvo por kompreni la rezultojn de la farataj agadoj kaj gvidi ilin. Plie, al la registaraj politikoj tre mankas buĝeto kaj

la kriterioj, sur kiuj oni pritaksas ilian sukceson, tute ne rilatas al la efektiva progreso de la lingvo en la socio. Siavice la neregistara porlingva agado montriĝas ankaŭ tre malforta.

Entute indus plani la starigon de Observejo de la Ĉuvaŝa Lingvo, kiu liveru fidindan fakan bazon por plani la lingvopolitikojn, mezuru ilian socian efikon kaj orientu ilian evoluigon. Prioritato de la tuta agado devas esti la haltigo de la interrompo de la intergeneracia lingvotransdono, ĉefe en la urboj, ĉar ĝi estas la esenca elemento por la daŭripovo de la ĉuvaŝa lingvo.

Pri la aŭtoro

Hèctor Alòs i Font estas licenciulo pri lingvistiko (Universitato de Barcelono), fakiĝinta pri socilingvistiko. Li nuntempe estas gast-instruisto pri la franca kaj hispana lingvoj en la Ĉuvaŝia Ŝtata Pedagogia Universitato, kie li lektias ankaŭ pri socilingvistiko. Liaj ĉefaj interesoj estas: lingvosociologio, lingvaj minoritatoj, renversado de lingvo-anstataŭado, lingva politiko, lingvaj rajtoj, lingva diverseco, internaciaj lingvoj, interlingvistiko. Kontakt-adreso: hectoralos ĉe gmail.com

Bibliografio

- Aracil, Ll. V. (1986 [1982]). *Papers de sociolingüística*. Dua reviziita eldono. Barcelono: La Magrana.
- Baskakov, A. N.; Nasyrova, O. D. (2000). “Jazykovye situacii v tjurkojazyčnyx respublikax Rossijskoj Federacii”. En: Mixal’ ĉenko k Krjučkova 2000: 34–129.
- Bastardas i Boada, A. (1991). “L’anàlisi de la situació sociolingüística: conèixer per transformar”. En: Trobada de serveis lingüístics (1991), 55–63.
- (2000 [1996]). *Ecologia de les llengües: Medi, contacte i dinàmica sociolingüística*. Barcelono: Proa.
- Boix i Fuster, E.; Vila i Moreno, F. J. (1998). *Sociolingüística de la llengua catalana*. Barcelono: Ariel.
- Borgoiakova, T. (2002). “Language law in Russia: models of implementation in Tyva and Khakassia”. [Rete: <<http://www.linguapax.org/congres/taller/taller1/Borgoyakova.html>>]
- Branchadell, A. (2005). *La moralitat de la política lingüística. Un estudi comparat de la legitimitat liberaldemocràtica de les polítiques lingüístiques de Quebec i Catalunya*. Barcelono: Institut d’Estudis Catalans.
- Brenzinger, M.; Heine, B.; Sommer, G. (1991). “Language death in Africa”. En: Robins k Uhlenbeck (1991), 19–44.
- Carles, S. (2006). *Diga-me, diga-li: metode audiòvisual d’ensenhament de l’occitan pels dròlles*. Enèrgas: Vent terral.
- Castellanos, C. (2000). *Llengua, dialectes i estandardització*. Barcelono: Octaedro.
- Cobarrubias, J.; Fishman, J. A. (red.) (1983). *Progress in Language Planning. International Perspectives*. Berlino: Walter de Gruyter.
- Comrie, B. (1981). *The languages of Soviet Union*. Kembriĝo: Cambridge University Press.
- Congrés Europeu sobre Planificació Lingüística (1997). *Actes del congrés europeu sobre planificació lingüística – European conference on language planning: Barcelona, 9 i 10 de novembre de 1995*. Barcelono: Generalitat de Catalunya, Departament de Cultura.
- Coordinadora Galega de Equipos de Normalización e Dinamización Lingüística (2009). “As linguas suman”. [Rete: <<http://www.coordinadoraendl.org/doc/linguassuman.pdf>>]
- Cooper, R. L. (1989). *Language Planning and Social Change*. Kembriĝo: Cambridge University Press.

- CPNL (Consorti per la Normalització Lingüística) (2008). *Memòria 2007*. [Rete: <<http://cpnl.cat/arxius/memories/Memoria2007.pdf>>]
- Crisp, S. (1989). "Soviet language planning 1917–53". En: Kirkwood (1989), 23–45.
- Cumming, J. (1989). "Immersion programs: Current issues and future directions". En: Segon Congrés Internacional de la Llengua Catalana (1989), 23–30.
- Čuvaškaja Respublika (1993). *Čávaš čelxine čërtes tata atalantaras ijtusem – Problemy vozroždenija i razvitija čuvaškogo jazyka*. Šupaškaro: Čávaš Respublikin Aslă Sovet Prezidiumě – Prezidium Verxovnogo Soveta Čuvašskoj Respubliki.
- (2000). "Konceptija nacional'noj školy Čuvašskoj Respubliki v sovremennoj sisteme obučenija i vospitanija". [Rete: <<http://www.indem.ru/Ceprs/Minorities/Chuvash/pNacShk.doc>>]
- (2003). *Zakon Čuvašskoj Respubliki ot 25 nojabrja 2003 g. N 36 "O jazykax v Čuvašskoj Respublike"*. [Rete: <<http://gov.cap.ru/home/96/ukaz/zakon№36.rtf>>]
- (2006). *Konstitucija Čuvašskoj Respubliki*. [Rete: <<http://gov.cap.ru/home/000/konstituz/konstituz.doc>>]
- (2007). *Zakon Čuvašskoj Respubliki ot 28 janvarja 1993 g. "Ob obrazovanii" (s izmenenijami ot 14 fevralja 1997 g., 23 oktjabrja 2000 g., 18 oktjabrja 2004 g., 25 nojabrja 2005 g., 2 ijunja 2006 g., 4 ijunja, 15 nojabrja 2007 g.)*. [Rete: <<http://gov.cap.ru/home/13/norma.baz/zacon%20obraz%20chuv.rtf>>]
- (2008a). "Postanovlenie Kabineta Ministrov Čuvašskoj Respubliki ot 6 dekabrja 2002 g. № 314 «O Respublikanskoj programme po realizacii Zakona Čuvašskoj Respubliki «O jazykax v Čuvašskoj Respublike» na 2003-2007 gody i na period do 2012 goda» (s izmenenijami ot 28 marta 2003 g., 20 dekabrja 2007 g., 28 ijulja 2008 g.)". [Rete: <<http://gov.cap.ru/hierarhy.asp?page=/16/29003/408264/417390/422876>>]
- (2008b). "Sistema meroprijatij Respublikanskoj programmy po realizacii Zakona Čuvašskoj Respubliki «O jazykax v Čuvašskoj Respublike» na 2003–2007 gody i na period do 2012 goda (priloženie № 1 k Programme)". [Rete: <<http://gov.cap.ru/hierarhy.asp?page=/16/29003/408264/417390/422876>>]
- (2008c). "Indikatory ocenki èffektivnosti realizacii Respublikanskoj programmy po realizacii Zakona Čuvašskoj Respubliki «O jazykax v Čuvašskoj Respublike» na 2003–2007 gody i na period do 2012 goda (priloženie № 2 k Programme)". [Rete: <<http://gov.cap.ru/hierarhy.asp?page=/16/29003/408264/417390/422876>>]
- (2008d). "Metodika rasčeta èffektivnosti realizacii Respublikanskoj programmy po realizacii Zakona Čuvašskoj Respubliki «O jazykax v Čuvašskoj Respublike» na 2003–2007 gody i na period do 2012 goda (priloženie № 3 k Programme)". [Rete: <<http://gov.cap.ru/hierarhy.asp?page=/16/29003/408264/417390/422876>>]
- (2008e). "Respublikanskij bjudžet na 2009 god i na planovyj period 2010 i 2011 godov: bjudžet rosta èkonomiki, kačestva žizni i social'nogo razvitija". [Rete: <http://gov.cap.ru/hierarhy_cap.asp?page=/196/22347/25616/25626/25627>]
- Desheriyeu, Ju. D. (1983). "From the soviet experience of the development of national languages". En: Fodor k Hagège (1983), vol. 1, 401–461.
- Div. aut. (1999). *Problemy nacional'nogo v razvitii čuvaškogo naroda*. Šupaškaro: Čuvaškij gosudarstvennyj institut gumanitarnyx nauk.
- DOGC (2008). "Decret 142/2008, de 15 de juliol, pel qual s'estableix l'ordenació dels ensenyaments del batxillerat". *Diari Oficial de la Generalitat de Catalunya*, n-ro 5183, 2008.07.29, 59 042–59 401.
- Druviete, I. (2001). "Language Policy and Protection of the State Language in Latvia". *Noves SL*, hivern. [Rete: http://www6.gencat.net/llengcat/noves/hm01hivern/internacional/a_druviete1_4.htm]
- Eusko Jaurlaritz (2009). *IV mapa sociolingüística, 2006*. Gasteizo: Eusko Jaurlaritz – Gobierno Vasco. [Rete: <http://www.euskara.euskadi.net/r59-738/es/contenidos/informacion/argitalpenak/es_6092/adjuntos/MAPAcast.pdf>]
- Fishman, J. A. (red.) (1977). *Advances in the creation and revision of writing systems*. Hago: Mouton.
- Fodor, I.; Hagège, C. (1983). *Language planning processes*. Hago: Mouton.

- Francard, M. (2009). "Regional languages in Romance Belgium". *International Journal of the Sociology of Language*, n-ro 196/197, 99–119.
- Haugen, E. (1983). "The Implementation of Corpus Planning: Theory and Practice". En: Cobarrubias k Fishman (1983), 269–289.
- Henze, P. B. (1977). "Politics and alphabets in Inner Asia". En: Fishman (1977), 371–420.
- Hill, J.; Hill, K. (1977). "Language death and relexification in Tlaxcalan Nahuatl". *Linguistics*, n-ro 191, 55–67.
- Horner, K.; Weber, J. J. (2008). "The Language Situation in Luxembourg". *Current Issues in Language Planning*, vol. 9, n-ro 1, 69–128.
- ISEI-IVEI (2005). *Nivel B2 de euskara al finalizar la educación obligatoria (4º ESO)*. Gasteizo: Eusko Jaurlaritza – Gobierno Vasco. [Rete: <<http://www.isei-ivei.net/cast/pub/B2CAST.pdf>>]
- (2007). *Nivel B1 de euskara en educación primaria. Informe general. Febrero 2007*. Gasteizo: Eusko Jaurlaritza – Gobierno Vasco. [Rete: <http://www.isei-ivei.net/cast/pub/b1_castellano.pdf>]
- Ivanov, V. P. (2005). *Ètničeskaja geografija čuvaškogo naroda*. Šupaškaro: Čuvaškoe knižnoe izdatel'stvo.
- Jakovlev, I. Ja. (1977). *Moja žizn'*. Moskvo: Respublika.
- Junyent, C. (1992). *Vida i mort de les llengües*. Barcelono: Empúries.
- Kirkwood, M. (red.) (1989). *Language planning in the Soviet Union*. Londono: MacMillan.
- (1997). "Language Ecology in Post-Soviet Russia: Problems and Prospects". En: Congrès Europeu sobre Planificació Lingüística (1997), 71–82.
- Kolga, M.; Tõnurist, I. k al. (1991). *The Red Book of the Peoples of the Russian Empire*. [Rete: <<http://www.eki.ee/books/redbook/>>]
- Konsilio de Europo (2007 [2001]). *Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. [Rete: <<http://www.edukado.net/pagina/REFERENCKADRO/18364/>>]
- Kornousova, B. (ed.) (2000). *Jazyki narodov Rossii: perspektivy razvitija. Minority languages in Russia: perspectives for development*. Elista.
- Kurakov, L. P. (1977). "I. Ja. Jakovlev i delo ego žizni". En Jakovlev (1977), 5–14.
- Kymlicka, W. (1995). *Multicultural citizenship. A liberal theory of minority rights*. Oksfordo: Clarendon Press.
- Lamuela, X. (1994). *Estandardització i establiment de les llengües*. Barcelono: Edicions 62.
- Lamuela, X.; Murgades, J (1984). *Teoria de la llengua catalana segons Fabra*. Barcelono: Quaderns Crema.
- Le Bihan, J. P. (1996). "La Bressola: Un nou sistema d'immersió lingüística". [Rete: <<http://pagesperso-orange.fr/escoles/immersio.htm>>]
- Macià, J.; Muñoz, A. M.; Gallart, M. (2009). *Altaveu (Llengua catalana i literatura de 2n de batxillerat)*. Barcelono: Ed. Teide.
- Nacional'noje Radio Čuvašii (2009). [Rete: <<http://gov.cap.ru/hierarhy.asp?page=/299/2899/574642/589704>>]
- Macnamara, J. (1971). "Successes and Failures in the Movement for the Restoration of Irish". En: Rubin k Jernudd (1975).
- Maurais, J. (1991). "Les lois linguistiques soviétiques de 1989 et 1990". *Revista de llengua i dret*, n-ro 15, 75-90.
- Mikhalchenko, V. Y. (2000). "Language decrees and language conflicts". En: Kornousova (2000), 448–454.
- Mixal'čenko, V. Ju.; Krjučkova, T. B. k al. (red.) (2000). *Jazyki Rossijskoj Federacii i novogo zarubež'ja: status i funkcii*. Moskvo: URSS.

- Monteagudo, H. (2008). “¿(Sal)irse de la lengua?”. *Dominio público*, 2008.07.08. [Rete: <<http://blogs.publico.es/dominiopublico/category/henrique-monteagudo/>>]
- Nelde, P. H. (1997). “On the Evaluation of Language Policy”. En: *Congrés Europeu sobre Planificació Lingüística (1997)*, 285–292.
- Ó Riagáin, P. (1997). “Evaluating Language Policies: Some Theoretical Considerations”. En: *Congrés Europeu sobre Planificació Lingüística (1997)*, 374–384.
- Peláez, B. (2009). “Récord de matriculaciones en euskera”. *El Correo Digital*, 2009.09.05. [Rete: <<http://www.elcorreodigital.com/vizcaya/20090905/pvasco-espana/record-matriculaciones-euskera-20090905.html>>]
- Petrov, N. P. (1980). *Čuvašskij jazyk v sovetskiju èpoxu. Razvitie social’nyx funkcii i literaturnyx norm*. Šupaškaro: Čuvašskoe knižnoe izdatel’stvo.
- Robins, R. H.; Uhlenbeck, E. M. (eds.) (1991). *Endangered languages*. Oksfordo: Berg.
- Rubin, J.; Jernudd, B. H. (1975). *Can language be planned? Sociolinguistic Theory and Practice for Developing Nations*. Honolulu: The University of Hawaii.
- Sebba, M. (2006). “Ideology and alphabets in the former USSR”. *Language Problems & Language Planning*, vol. 30, n-ro 2, 99-125.
- Segon Congrès Internacional de la Llengua Catalana (1989). *Segon Congrès Internacional de la Llengua Catalana. VII: Àrea 6. Ensenyament*. Tarragona: Segon Congrès Internacional de la Llengua Catalana.
- Statistika Rossii (2004-2005). *Vserossijskij perepis’ naselenija*. 14 Vol. [Rete: <<http://www.perepis2002.ru>>]
- Trobada de serveis lingüístics (1991). *Primera trobada de serveis lingüístics: Barcelona, 5 i 6 de novembre de 1990*. Barcelono: Generalitat de Catalunya, Departament de Cultura.
- UNESCO (2009). *Unesco Interactive Atlas of the World’s Languages in Danger*. [Rete: <<http://www.unesco.org/culture/ich/index.php?pg=00206>>]
- Viktorov, O. N.; Isaev, Ju. N. k.a. (1996). *Russko-čuvašsko-anglijskij slovar’ juridičeskix terminov*. Šupaškaro.
- Xuzangaj, A. P. (1999). «Problema jazykovogo suščestvovanija čuvašskogo ètnosa i perspektivy jazykovoj politiki». En: *Div. Aut.* (1999). 88–106.
- Weinreich, U. (1953). *Languages in Contact. Findings and Problems*. Hago: Mouton.

Ĉiuj ret-adresoj estis kontrolitaj en oktobro 2009.